

1/2021

Januaro  
Februaro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ **Argenta Mazi**
- ★ **Esperantistoj en la Varsovia Geto**
- ★ **La plej granda palaco en Eŭropo**

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Magdalena Tatara,  
Andrzej Sochacki, Adam Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 53 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoĵoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendadas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj  
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001  
liberan monsumon priskribu  
per vorto "Darowizna"



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Marek Mazurkiewicz el Varsovio.

BY: Alina Zienowicz (Ala z) e-mail, CC BY-SA 3.0 <https://creativecommons.org/licenses/by/3.0>,  
Wikimedia Commons

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Robert Kamiński, Ĉi-jare vi povas denove subteni la Polan Esperanto-Asocion</i> .....	3
<b>Eventoj</b>	
<i>Nina Pietuchowska, Virtualaj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj</i> .....	5
<i>Jagoda Greger, Reta kurso de Esperanto en Sopot</i> .....	7
<b>Mojose</b>	
<i>www.pej.pl, Sekva reta E-kurso de PEJ</i> .....	7
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Ulrich Lins, Esperantistoj en la Varsovia Geto</i> .....	8
<i>Kasia Wybrzak, Mi ludos por vi la polan himnon</i> .....	11
<i>https://tiny.pl/r17rt, Ĉu la mara industrio spertos veran revolucion?</i> .....	18
<i>Małgorzata Komarnicka, Ni savu nian domon, nian teron, nian mondon, nin mem – ĉu ekologio estas modo aŭ devo?</i> .....	15
<i>Roman Dobrzyński, Arĝenta Mazi</i> .....	17
<i>Magdalena Tatara, Iga Świątek - reĝino de Parizo</i> .....	21
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Marija Belošević, prezidantino de IKUE, Tertremo en Kroatio</i> .....	22
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Robert Kamiński, La plej granda palaco en Eŭropo</i> .....	23
<b>Homoj</b>	
<i>Jolanta Kieres, Rememoro pri Bronisław Kieres</i> .....	26
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, De rilate al vorteto</i> .....	27
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Elżbieta Karczewska, Belega Davido à la kronviruso</i> .....	28
<i>Gizela Sklorz, Versaĵoj</i> .....	30
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Jarka Malá el Ĉeĥio, Pri la vakcin-simila efiko de la protektaj maskoj</i> .....	30
<b>Leterkesto</b>	
<i>Mireille Grosjean, Kongreso de ILEI en 2021</i> .....	33
<i>Adam Wilkus, Denove pri ŝakoj</i> .....	33
<b>Kalendaro</b>	34
<b>Diverse, facile, bonguste</b>	
<i>Magdalena Tatara, Pirogoj - tradicia pola manĝaĵo</i> .....	35
<b>Oni eldonis</b>	
<i>“Bjalistokaj kajeroj” n-ro 10, „Esperanto-Movado en Vroclavo kaj Malsupra Silezio”, „Lernado per kantado”</i> .....	36
<b>Forpasis</b>	
<i>Halina Marta Oleszek, Bronisław Kieres, Zygmunt Lange</i> .....	37
<b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki, 6-aj Esperantaj Tagoj de Staszów, 21-24.05.1992</i> .....	38
<b>Amuze</b>	

<i>Adam Wilkus</i> , Krucenigmo pri fungoj .....	40
Zamenhof/Esperanto-Objekto	
<i>Robert Kamiński</i> , Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando – 1 .....	44

## Redaktoraj vortoj

Estimataj legantoj!

Mi ne volus komenci denove pri pandemio. Sed kial ne tuŝi tiun temon. Ĉar ni ne povas fuĝi de nia realo, kiu influas ĉiujn niajn planojn. Venis la jaro 2021 kaj ni devas decidi pri jam prokrastita pola-germana kongreso. La organizantoj el PEA kaj GEA jam du foje (en januaro kaj februaro) renkontiĝis per interreto kaj diskutis pri eblaj formoj de la kongreso. Nun nia kongreso estas „senhejma”, ĉar la ambaŭ universitatoj - Adam Mickiewicz-Universitato kaj Universitato Viadrina ne povas konfirmi luadon de salonoj por fino de majo. Ĉu la kongreso povas okazi en ĝisnuna formo? Kiom da personoj volus veni al Słubice kaj Frankfurt? Kion fari se venos 80 kongresanoj kaj la cirkonstancoj en la lasta momento permesos akcepti nur ekz. 50? Neniu organizanto povas antaŭvidi, kio povas okazi en majo. Povas esti, ke ni sukcesos organizi nur la virtualan kongreson. La sekva retkunveno de organizaj teamoj okazos meze de marto. Pri ĝiaj rezuloj ni nepre vin informos.

Proksimiĝas la periodo por kalkulado de nia imposto de 2020j kaj transdono de ĝia parto al sociaj celoj. Kiel en la antaŭa jaro, ni volas kuraĝigi vin subteni Polan Esperanto-Asocion kaj donaci al ni unu procenton de via imposto per la fondaĵo FaniMani. La detala priskribo troveblas sur la paĝo 3.

En la nuna numero de PE, gravas ne preterlasi la gravan artikolon de Ulrich Lins pri esperantistoj en Varsovia Geto. La unuan fojon ni havas la honoron prezenti artikolon de tiu fama historisto de Esperanto-movado. Priskribita de li la tragika etapo de Esperanto-movado en Eŭropo ne estas vaste dokumentita kaj la artikolo pliprofundigas nian scion pri ĝi.

Helpe de nia revuo vizitu ankaŭ, iam la plej grandan en Eŭropo palacon Krzyżtopór/ (Krucotoporo).

Nia eminenta kunlaboranto Roman Dobrzyński ĉifoje interese rakontas pri esperantigo de la filmo „Mazi en Gondolando” dank’ al kiu multaj komencis lerni Esperanton.

Atentu ankaŭ pri aliaj aŭtoroj, kiel ekz. Małgorzata Komarnicka, kiu komencas skribi por Pola Esperantisto” serion de artikoloj pri ekologio.

Ek de tiu ĉi numero ni prezentos en „Pola Esperantisto” liston de polaj objektoj, kunligitaj kun Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto-movado (ZEO-j). La nombro de ZEO-j en nia lando atingis jam 238 kaj en sekvaj ses numeroj legeblas kompleta pola ZEO-listo.

Serĉu ankaŭ aliajn interesajn temojn.

*Robert Kamiński*

Robert Kamiński

### Ĉi-jare vi povas denove subteni la Polan Esperanto-Asocion

Ĉiuj scias, ke la organiza agado kaŭzas kostojn. Esperantistaj organizaĵoj ĉiam sentas tiun problemon. Ni, estraranoj, laboras senpage, sed por aliaj aferoj oni devas pagi. Temas pri printado de E-informiloj, energio, korespondado ktp. Varsovia Filio de PEA havas propran sidejon. Lukostoj estas altaj kaj ne sufiĉas



por tio tre altaj membrokotizoj en la varsovia filio. La propra sidejo (kun E-biblioteko) estas tre grava. Ĝi servas ankaŭ por la Ĉefa Estraro kaj por Pola Esperanto-Junularo. Eksterlandaj gastoj ofte estas akceptataj ĉe la strato Andersa en Varsovio. La organizaĵo devas havi almenaŭ unu reprezentan sidejon, kiu permesas serioze trakti ĝin. La Ĉefa Estraro kaj varsoviaj esperantistoj ĉiam klopodas trovi monhelpon. Ni trovis kaj praktikas du efikajn manierojn por la monsubteno.

La unua preferinda maniero, kiel akiri 1% de nia imposto por la Pola Esperanto-Asocio estas helpo per la fondaĵo FaniMani. Tiu maniero estas efika kaj per ĝi en la jaro 2019 PEA ricevis 1200 zlotojn.

FaniMani Fondaĵo havas la statuson de OPP – Organizo de Publika Utilo (Organizacja Pożytku Publicznego). Plenumante siajn statutajn celojn, ĝi apogas neregistarajn organizaĵojn kaj lernejojn, kolektante monon por ilia statuta agado. La fondaĵo ebligas al ĉiuj registritaj en FaniMani organizaĵoj (kiuj ne havas la statuson de OPP), uzi 1% de imposto, kolektita de la Fondaĵo FaniMani.



faniMani.pl

kolektitaj

(supozante ke la Fisko-Oficejo realigos la pagojn por 1% de la detalaj celoj ĝis la fino de julio 2021).

FaniMani Fondaĵo prenas

neniujn kotizojn. Transdono de la

financoj al organizaĵoj okazos aŭtune 2021

Jen simplaj paŝoj por provizi unu procenton por PEA:

- En deklaro PIT-37, en la kampo 132, skribu **“KRS: 0000507234”**

(se jam tie estas iu KRS, forstreku ĝin kaj subskribu apude)

- En la kampo 134 skribu **“Fundacja FaniMani”** kaj la kodon de la detala celo **“22781”** (se tie jam ekzistas nomo de alia organizaĵo, forstreku ĝin kaj subskribu. Ne skribu nomon de PEA, nur kodon de nia organizaĵo). La kodo 22781 estas registra kodo de PEA en la fondaĵo FaniMani.

Se vi jam sendis vian deklaron al Fisko-Oficejo, vi povas sendi ĝin denove. Vi nur devas, en la kampo 10, signi per kruceto, kvadraton n-ro 2 “korekta” kaj korekti nomon de fondaĵo, KRS-numeron kaj la detalan celon laŭ la supra priskribo.

**La dua maniero** estas lerta aĉetado per interreto. Mono, kolektata tiamaniere, ne estas impona, sed **ĉiu helpo estas tre grava**. Enreta aĉetado fariĝis tre populara kaj ofta – preskaŭ ĉiutage. Aĉetante en 1030 enretaj butikoj, vi povas mone subteni Polan Esperanto-Asocion. Kiel fari tion? Maniero estas tre simpla. Aĉetu ion helpe de la retejo <https://faniMani.pl>. Ĝis 2.5% de la kvanto de aĉeto estos akreditata, kiel donaco, al la PEA-konto.

#### **Jen kvar simplaj paŝoj:**

- Venu al retejo [www.fanimani.pl](http://www.fanimani.pl)
- Registriĝu en la retejo.
- Elektu helpon por Polski Związek Esperantystów.
- Aĉetu ion. Se vi la unuan fojon aĉetas en la elektita vendejo, vi devas registriĝi en la vendejo.


Inter retvendejoj vi povas trovi: Allegro, Aliexpress, RTV-AGD, LOT, BookingCom, Flixbus kaj centojn da aliaj.



*Nina Pietuchowska*

## Virtualaj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj

Dum la tagoj 11 – 13. 12. 2020 okazis, jam tradiciaj, 21-aj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj. Ĉijare ili okazis malgraŭ la kronviroza pandemio, dank al moderna teknologio. Tiamaniere niaj Zamenhof-tagoj estis organizitaj la unuan fojon. Kompreneble, ni renkontiĝis rete, nur malmultaj renkontiĝis reale en la Centro Ludoviko Zamenhof (CLZ) aŭ en la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Societo. Organizati ĉion estis samtempe facile kaj malfacile: ĉu funkcios la reto, ĉu funkcios ĉiuj konektoj, komputiloj, kameraoj, kabloj, mikrofonoj, ĉu estos kurento kaj aliaj teknikaĵoj. Dank al niaj gespertuloj, Przemysław Wierzbowski (la prezidanto de BES) kaj **Ines Kahin** (nia volontulino el Tuluzo), ĉio funkciis bone.



**Vendrede** en CLZ Elżbieta Karczewska (Podlaĥia Biblioteko/Zamenhof Libraro) anoncis rezultojn de la 10-a literatura konkurso, organizita de la Podlaĥia Biblioteko kaj BES „Esperanto ligas homojn. Pandemio: neĉiutaga ĉiutageco”.

La honora patrono de la konkurso estis la prezidento de Bjalistoko Tadeusz Truskolaski. Venis verkoj ne nur el Pollando. Ili aperis en Bjalistokaj Kajeroj n-ro 10. La unuan premion gajnis E. Karczewska, la duan A. Liczmonik, la trian J. Rut-Thiam. Estis ankaŭ prezentita la kvaronjara revuo KARTA, en kiu aperis interesa artikolo „La lingvo kontraŭ malamikeco. Esperanto 1887-2020”.



Fine prezentiĝis junaj artistoj el la bjalistokaj grupoj „Młoda Folk Krew”, „Uku-Donaco Bjalistoko” kaj la konata inter esperantistoj „Frey-Lech Trio”. Estis la eblo aŭskulti klezmeran muzikon kaj muzikon kun podlaĥiaj elementoj.

**Sabate** okazis multaj prelegoj, kompreneble virtuale, je diversaj temoj. Kiel kutime, oni metis florojn ĉe la monumento de L. L. Zamenhof. Samtage okazis ankaŭ du koncertoj de Tim Gallego (Germanio) kaj Kajto (Nederlando). **Dimanĉe** okazis virtuala ekskurso al la urbeto Supraśl. Preparis ĝin kune Iza Walentynowicz kaj Ines Kahin, kiuj pli frue devis



veturi al la urbeto, marŝi en ĝi, fari fotojn kaj poste prepari ĉion. Multaj malpacience atendis la ekskurson, por vidi, kiel aspektas virtuala eksursado. Rete ĉeestis ĉijarajn Zamenhof-tagojn kelkdek personoj ĉiutage. Por lokanoj, kompreneble, la aranĝo mankis surloke, mankis por ni komunaj vesperaj babiladoj. Mi esperas, ke sekvontaje la pandemio finiĝos kaj ni povos renkontiĝi surloke.

---

*Jagoda Greger*

## Reta kurso de Esperanto en Sopot

La Tri-Urba Esperanto-Asocio "Torento" organizis interretan Esperanto-kurson por komencantoj. La kurslibro estas "Esperanto en dek lecionoj" de Paweł Wimmer, kiu estas libere havebla en la interreto kaj ĉiuj povas kopii kaj presi ĝin.

La interreta kurso estas kondukita de Henryk Kosicki de nia Asocio. La unua leciono de la kurso okazis la 12-an de januaro 2021. Ni invitas vin kontakti nin: [torentosopot@wp.pl](mailto:torentosopot@wp.pl)



## Mojose

*Pola Esperanto-Junularo - [www.pej.pl](http://www.pej.pl)*

## Sekva reta E-kurso de PEJ

La komenco de la jaro taŭgas por lerni novajn aferojn kaj (ŝajne) alfronti defiojn, do ni organizas la duan eldonon de la interreta kurso de Esperanto, kiu komenciĝis la 14-an de januaro! Ĉi tio estas kurso por homoj, kiuj jam lernis la bazojn de Esperanto en nia interreta aŭtuna kurso, aŭ kiuj memstare lernas hejme - nivelo A2/B2. Ĉi tiu kurso ne celas tute novajn komencantojn. Kursoj okazas ĉiun ĵaŭdon je la 18:00. La kurso estas dediĉita por homoj de 16 ĝis 30 jaraj. La totala kosto de partopreno en la kurso estas 150 PLN (pagota antaŭ ol la kurso komenciĝas). La kurso inkluzivas 10 interretajn renkontiĝojn, de 14/01 ĝis 18/03/2020.

*Ulrich Lins*

## Esperantistoj en la Varsovia Geto

En la historio de pereigado de judoj ofte elstare menciigās la Geto, kiun kreis la germanaj nazioj ekde la somero de 1940 meze de la pola ĉefurbo Varsovio. La bazaj faktoj pri tio, kiel la nazioj unue per mizerigo kaj malsatmortigo, poste per sistema murdado ekstermis la plej multajn judojn en Pollando, iĝis intertempe konataj dank' al multaj libroj kaj sciencaj studoj, aperintaj en pluraj lingvoj.

Iom longe tamen mankis serioza trakto esperantlingva. Tio estas surpriza, kiam ni konsideras la fortan rilaton de la Geto al Zamenhof kaj Esperanto. Dum la milito la movadaj revuoj regule raportis, ke familianoj de Zamenhof vivas en Varsovio. Ili ne povis doni detalojn pri ilia farto, sed UEA jam la 5-an de decembro 1939 alarmis pri nekredeblaj informoj, interalie pri tio, ke “Juda Rezervujo” estas “instalata en Centra Polujo”. Tiam oni ankoraŭ ne parolis pri geto en Varsovio (ĝi estis kreita en oktobro/novembro 1940), sed en la cirkulero de UEA frue aperis drasta formulo, kiu kun nia nuna scio sonas antaŭvide: “Aldone al la rasleĝoj tiuj kondiĉoj celas certan ekstermon de la juda loĝantaro.” UEA kadre de sia servo “Esperantista Interhelpo” starigis fondaĵon por helpo al la familio Zamenhof. La unua alvoko estis sendita al minimume kvinmil adresoj. Al la esperantistoj, kiuj grandnombre kaj -anime reagis, la revuo povis sciigi en februaro 1940 nur: „Nenio nova pri la Familio Zamenhof! [...] Ŝajnas, ke la tuta lando estas hermetike fermata por ni Esperantistoj. La stato de la loĝantaro en Polujo estas ĉiel malfavora, por ne diri pli multe.”

UEA iom poste havis kontakton precipe kun Lidia kaj energie apelaciis al siaj membroj helpi ŝin kaj aliajn esperantistojn. Ĝis oktobro 1940 UEA sukcesis kolekti kaj grandparte distribui sumon de 6000 svisaj frankoj. Adam Czerniaków, la prezidanto de la Juda Konsilantaro en Varsovio, devanta plenumi la ordonojn de la naziaj okupaciantoj, en sia taglibro notis la 8an de majo 1940, ke „esperantistoj el Ĝenevo“, do UEA, volas doni helpon al la familio Zamenhof. Hans Jakob nome de UEA paralele sondis, ĉu eblas aranĝi por Zamenhofoj litovan ŝtatanecon, sed ankaŭ tiu eta espero disbloviĝis, post kiam en somero 1940 Litovio estis aneksita de Soveta

Unio. Komence de 1941 Jakob informis, ke la provo organizi elmigron de Lidia al Usono malsukcesis.

La Varsovia Geto ekde julio 1942 servis kiel kolektejo de judoj deportotaj al la neniigejo Treblinka. Ida kaj Zofia Zamenhof pereis tie la 6-an de aŭgusto 1942, verŝajne samtage kiel la fama juddevena kuracisto Janusz Korczak, kiu akompanis la de li prizorgatajn orfajn infanojn ĝis Treblinka. Proksimume unu monaton poste ilin sekvis por sama terura morto Lidia Zamenhof.

Ke la gefiloj Adam, Lidia kaj Zofia estis mortigitaj kaj ke la familia domo en la strato Królewska detruigis, oni eksciis nelonge post la milito, ankaŭ, ke nepo, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof (1925–2019), kaj la patrino transvivis. Sed kun li longe apenaŭ estis kontakto, ĉar ekde 1959 li vivis en Francio; la profesia establiĝo tie ne lasis al li multe da tempo por Esperanto. Ankaŭ ŝajnas, ke li nevolonte estis memorigita pri la Geto, kiun li mem eskapis pro bonŝanco. Tamen, de 1987 ĝis 2015 la nepo preskaŭ regule partoprenis Universalajn Kongresojn de Esperanto.



Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof kun la patrino Wanda (sub flageto, kiun li tenas) kaj grupeto de varsoviaj esperantistoj sur ruino de domo en kiu loĝis L.L. Zamenhof ĉe la Zamenhof-str. 7 (1946)

Ke la areston de familianoj de Zamenhof antaŭis speciala ordono el Berlino, unuafoje mencias Marjorie Boulton en sia Zamenhof-biografio (1960) kaj, sekve de persona informo de la nepo (23-11-1968), la verko *Esperanto en perspektivo* (1974). (Precizigoj estas en *La danĝera lingvo*, 2016, p. 110.) Isaj Dratwer, transvivinto de la Geto, publikigis en 1980 libron pri Lidia. En 2000 kaj 2003 aperis studoj de Zofia Banet-Fornalowa pri la familio Zamenhof kaj pri ses gravaj jud-polaj pioniroj, inter ili Leopold Blumental (Leo Belmont) kaj la „radikala esperantisto“ Izrael Lejzerowicz, kiun pli detale prezentas eseo aperinta en *Beletra Almanako* (2020, n°38). En 2003 fine Zaleski-Zamenhof konigis siajn memorojn. Pro tiuj kaj aliaj studoj ni estas nun kontentige informitaj pri la sorto de la familio kaj de aliaj esperantistoj.

Tra la jaroj ĝenerale pliboniĝis la dokumentado pri la individua sorto de judaj viktimoj de la nazia eksterm-politiko. Elstare kontribuas ekzemple la memorejo Yad Vashem en Jerusalemo. Ĝia datumaro tamen ne ĉiam indikas la esperantistecon de viktimo. Dank' al sciigoj liveritaj de Josef Ŝemer (1950–2012) ekde 2007 estas tie poreterne registritaj Ida Zimmermann, la fratino de L.L. Zamenhof, liaj gefiloj Adam, Lidia kaj Zofia kaj la bofilino Helena kaj la nepino Irena. Registritaj estas ankaŭ aliaj judaj esperantistoj: la hungara József Takács, la ĉeĥa Petr Ginz plej riĉe dokumentita, la germanaj Julius Glück kaj Julius Hanauer, la aŭstra Hugo Maier kaj pluraj polaj judoj: Leopold Dreher, Jakub Szapiro, Edward Wiesenfeld kaj du juddevenaj poloj, kiuj vivis en Francio: la ĵurnalisto Salomon Kornfeld (Grenkamp) kaj la aktivulo de Juda Esperantista Grupo en Parizo, Icek Jurysta<sup>1</sup>. Honoran lokon Yad Vashem donas al „Justuloj de la Mondo“, t.e. nejudoj, kiuj savis judojn. Inter ili estas ankaŭ esperantistoj: la rus-sveda paro Nina kaj Valdemar Langlet, la ĉeĥo Přemysl Pitter kaj la litovo Antanas Poška.

Pluraj memorindaj judaj esperantistoj ankoraŭ ne estas registritaj en Yad Vashem, ekzemple bona amiko de Zamenhof, Leo Belmont, kiu pro tifo mortis en oktobro 1941<sup>2</sup>, kaj Anna Weinstein, kiu kun sia filino Halina proksime rilatis kun Janusz Korczak<sup>3</sup>. Ili kun multaj aliaj pereis en la Geto

---

1 Vidu <https://www.czestochowajews.org/wp-content/uploads/Cz%C4%99stochowa-1958-Book-Jurysta-pp-133-135.pdf>

2 Belmont kaj la poeto Mieczysław Braun pereinta en 1941 aŭ 1942 apartenas al la esperantistaj viktimoj, kiuj troviĝas en <https://yivoencyclopedia.org/>.

3 Per *Bonhumoraj rakontoj* (Esperanta traduko de Anna Weinstein, Berlin, Rudolf Mosse, 1927) Korczak unuafoje konatiĝis ekster Pollando: <https://tiny.pl/r172b>

aŭ, same kiel Paulina Muszkatblat, Eugenia Pasztejn, Izaak Krenicki kaj Izrael Lejzerowicz, en Treblinka.

#### Bibliografio

Banet-Fornalowa, Zofia, "Janusz Korczak", *Monato*, 1998, n-ro 10, pp. 17–19 (<https://tiny.pl/rl728>)

---, *La familio Zamenhof*, La Chaux-de-Fonds, Kooperativo de Literatura Foiro, 2000.

---, *La pereintoj in memoriam*, Czeladź, Hejme, 2003.

Boulton, Marjorie, *Zamenhof: Creator of Esperanto*, London, Routledge and Kegan Paul, 1960. (Aperis ankaŭ en Esperanto, 1962)

Dobrzyński, Roman, *La Zamenhof-strato, verkita laŭ interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof*, Kaunas, Varpas, 2003 kaj 2005. (Tradukita en 15 lingvojn)

---, *Zamenhof en Varsovio*, Rotterdam, UEA, 2017. (Ankaŭ pola kaj angla tradukoj)

Dratwer, Isaj, *Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado*, Antverpeno, tk, kaj La Laguna, Stafeto, 1980.

Heller, Wendy, *Lidia: The Life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto*, Oxford, George Ronald, 1985. (Tradukita en Esperanton, 2007, kaj la polan, 2009)

Hilberg, Raul, k.a., ed., *The Diary of Adam Czerniaków: Prelude to Doom*, New York, Stein and Day, 1979.

Jakob, Hans, *Servisto de l' ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio 1908–1958*, Antwerpen, Flandra Esperanto-Ligo, 1995.

Lins, Ulrich, *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*, Rotterdam, UEA, 2016.

---, "Izrael Lejzerowicz: radikala esperantisto", *Beletra Almanako*, 2020, n-ro 38, pp. 95–107.

Sakowska, Ruta, *Menschen im Ghetto. Die jüdische Bevölkerung im besetzten Warschau 1939–1943*, Osnabrück, Fibre, 1999. (Trad. el la pola)

---

„Wolność”, *Kasia Wybrzak*

Tradukis: *Robert Kamiński*

## Mi ludos por vi la polan himnon

Somera tago de 1945. Eŭropo ĵus spiris trankvile post la longa milito, kiu trairis la kontinenton. Jen War Memorial Opera House en San Francisco. Kunvenis tie kvindek delegacioj el la plej diversaj landoj de Eŭropo kaj la mondo. Oni volis fari paŝojn por certigi, ke tia milita tragedio neniam plu okazu. La kreiĝanta tiamaniere organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj devas gardi

pacon kaj egalecon. Dum la asembleo estis videbla manko de unu delegacio. Ne aperis dum la kunveno la pola registaro. Tamen, tiutage Pollando havis neatenditan reprezentanton.



La delegitoj en War Memorial Opera House en San Francisco

La pola delegacio ne povis aperi dum la subskriba ceremonio de de Unuiĝintaj Nacioj pro politikaj kialoj. Tiu-tempe la nova registaro, kreita en Pollando, ne estis akceptata de ĉiuj ŝtatoj. Usono, Anglujo, Francio kaj aliaj occident - eŭropaj landoj agnoskis la ekzilan polan registaron en Londono.

Tion ne povis akcepti Sovetunio, kiu celis forigi la komunistan potencon en Pollando. Pro tio la pola delegacio ne aperis.

La diplomatoj kaj delegitoj amase renkontiĝis por **koncerto festanta ĉi tiun gravan solenaĵon**. Por la prezentado de la koncertprogramo estis



invitita Artur Rubinstein, konata kaj aprezata en la tuta mondo, la pola pianisto, juddevena loĝanto de Łódź<sup>4</sup>. Li bonege sciis, kiom grava estis ĉi tiu tago, ĉar li mem perdis preskaŭ tutan sian familion, kiun murdis nazioj dum la milito. La pianisto trarigardas multajn flagojn de la kunvenitaj delegacioj el la tuta mondo. Sed li ne vidas tiun unu, tiel atendatan. Por komenci, li ludas la himnon de Usono, la gastiganto de ĉi tiu

grava, tutmonda evento. Li sentas, ke la kolero kreskas en li. Kia estas la

---

4 La plej granda kolekto de memoraĵoj post Arthur Rubinstein troviĝas en la Muzeo pri Historio de la Urbo Łódź.

miro de la eksterlandaj altranguloj, kiam li subite leviĝas de sia piano kaj diras:

"Ĉi tie, en ĉi tiu ĉambro, vi volas aranĝi feliĉan estontecon por la mondo. Mankas al mi la pola flago, por kiu vi batalis." Rubinstein anoncas amare: "Mi ne povas tion toleri. Mi ludos por vi la polan himnon, kaj bonvolu ekstari!"

Ĉiuj delegacioj ekstaris. Leviĝis eĉ la delegacio de Sovetunio, estrita de la ministro Molotov, la sama, kiu ses jarojn antaŭe subskribis la neagresan pakton kun Ribbentrop, la ministro de la Tria Regno. En la War Memorial Opera House, eksonis la pola himno "Mazurek Dąbrowskiego". Post kiam la muziko finiĝis, la pianisto estis aplaŭdita per tondraj ovacioj.

Tiutage Pollando ne subskribis la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, sed

restis por ĝi speciala loko. Pollando subskribis ĝin en oktobro de la sama jaro kaj ĝis hodiaŭ estas konsiderata kiel membroŝtato de Unuiĝintaj Nacioj ekde la tago de ĝia fondiĝo.



Pola ministro Wincenty Rzymowski subskribas Ĉarton de UN la 16-an de oktobro 1945

---

<https://tiny.pl/r17rt>,

Tradukis: *Robert Kamiński*

## Ĉu la mara industrio spertos veran revolucion?

Pasaĝeraj kaj transportaj ŝipoj, navigantaj inter landoj, bruligas neimageblajn kvantojn da oleo, kio kontribuas al la enormaj eliroj de poluado. DFDS, (dana marvetura firmao), eble havas solvon.

La mara industrio estas ofte preteratentata, kiam temas pri klimataj problemoj. Aŭtoj kaj fabrikoj estas plej ofte menciataj kiel la tragikaj kaŭzoj

de poluado. Fakte, la akva transporto elsendas preskaŭ 940 milionojn da tunoj de CO<sub>2</sub> (karbona dioksido) ĉiujare, kiu respondecas pri 2,5% de la tutmonda emisio de la forcejaj gasoj.

Eŭropa Unio jam delonge alvokas al disvolvo de ŝiparo, bazita sur elektraj aŭ ventaj motoroj. Malgraŭ tio, funkciantaj surbaze de la marakva transporto ankoraŭ baziĝas je dizela brulaĵo. La disvolviĝo de teknologioj, kiuj grave reduktus poluajn emisiojn kaj la anstataŭigo aŭ modernigo de la ekzistanta floto, ofte superas la raciajn kostojn de la tuta ideo.

Unu el la solvoj de ĉi tiu problemo povas esti la projekto de la dana, internacia ekspeda kompanio DFDS, kiu jam de kelka tempo laboras pri la elektra veturado, bazita sur hidrogenaj fuel-piloj. Tiaj motoroj ne nur kontribuas al redukto de malutilaj emisioj, sed ankaŭ aŭtomate produktus purigitan akvon dum la vojaĝo. Kompreneble, ankoraŭ ekzistas la demando kiel produkti sufiĉe da hidrogeno, por funkciigi la transportilojn.

Tiun taskon plenumas la loka energia kompanio „Ørsted”, kiu jam laboras kun DFDS kaj aliaj ĉefaj ludantoj en la industrio por produkti verdan hidrogenon per elektrolizo. La metodo implicas nukleodividiĝon de akvo en hidrogenon kaj oksigenon per la enmaraj ventaj elektroproduktiloj. Pluraj el ili jam situas proksime al la kopenhaga haveno. Kiel la unua grava aĉetanto de la tiamaniere produktata brulaĵo, DFDS esperas helpi pliigi la postulon de hidrogeno, revivigi la merkaton kaj finfine malpliigi la koston de la konstruado de necesa infrastrukturo por produkti ĝin.



Projekto de vent-elektra pramo "Oceanbirdo"



Kvankam ĉi tiu solvo ŝajnas ideala, oni ne forgesu pri ĝiaj malavantaĝoj. Hidrogeno eligas nur akvon, sed al ĝia uzo rilatas multaj zorgoj pri sekureco. La hidrogena brulaĵo devas ne nur esti tenata en ekstreme malaltaj temperaturoj, sed ankaŭ sub tre alta premo, ĉirkaŭ 250 baroj. Ĝi per si mem ankaŭ estas ekstreme eksplodema.

Ĉi tio signifas, ke la tuta ŝiparo devus esti tute restrukturita. Temas interalie pri la tuta elektronika sistemo, uzata por regi la maŝinejon, kiu devus plenumi striktajn kriteriojn, por la ebla ekbruliĝo. Krome, la hidrogeno mem okupas multe pli da spaco ol la norma brulaĵo, kaj ĉi tio povas esti sufiĉe defio por kargoŝipoj, kie ĉiu spaco estas ege multekosta.

Kompreneble, oni povus uzi speciale desegnitajn hibridajn sistemojn, kiuj funkcias simile kiel en aŭtoj. Ŝipoj povus uzi hidrogenan propulson proksime al la haveno, kio reduktus lokan poluadon, kaj en malfermaj akvoj funkciigus brulmotorojn.

Alian interesan ideon ĵus proponis la sveda konsorcio, prezentante la koncepton de vent-elektra pramo. La ŝipo nomiĝos „Oceanbirdo” kaj estos ekipita per veloj el ŝtalo kaj kunmetaĵoj, kies turniĝanta bazo ebligas optimuman kapton de la vento, sendepende de la kondiĉoj. La ŝipo ankaŭ povos aldone mallevi aŭ mallongigi la areon de tiaj "flugiloj". La kombinaĵo de aviadaj kaj ŝipkonstruaj teknologioj devas ebligi la ŝipon akceli eĉ 10 nodojn (ĉirkaŭ 20 km/h).

Sendepende de tio, kiu el la solvoj montriĝos pli bona kaj malplimultekosta, estas sendube, ke antaŭ la akva transporto estas grandaj ŝanĝoj, simile kiel en la nuna aŭtoindustrio.

---

*Małgorzata Komarnicka*

## **Ni savu nian domon, nian teron, nian mondon, nin mem - ĉu ekologio estas modo aŭ devo?**

Ĉu la mondo, kiun ni konas, en kiu ni vivas jam malaperas...? Ĉu ni sukcesos ekregi degradadon de la naturmedio? Ĉu ni savos ankoraŭ, en kelkaj lokoj *nemalpurigitan naturon*? Ĉu ni scipovas haltigi turisman ekspansion, kiu por multaj lokoj estas danĝera kaj gvidas al ilia neniigo? Ĉu ni scipovas haltigi klimatsanĝojn, eltranĉon de pluarbaroj, malpurigadon de arbaroj kaj oceanoj? Ĉu ni pretas ŝanĝi nian pensmanieron pri manĝaĵo,

vestiĝado, mondperceptado? Ĉu ni konscias, ke baldaŭ ni ne vidos multajn specojn de bestoj kaj plantoj en ilia natura medio? Ĉu ekologio estas ankoraŭ por ni modo aŭ jam respondeco kaj devo?

Certe nia ekologia konscio kreskas. Multaj el ni pli larĝe rigardas protekton de la medio. Bedaŭrinde, niaj ĉiutagaj agoj (konsumado, malŝparo de energio kaj akvo aŭ manko de ordigado de rubaĵoj) konstante grandparte estas senprudentaj. Kaj ja ni estas parto de la naturo. Detruante ĝin ni detruas ankaŭ nin mem. Ni devas, kiel plej rapide, fariĝi pli sentemaj je tutmondaj danĝeroj kaj pli rapide lerni, kiel ilin preventi. Nur tiam ni pli bone komprenos dependecon inter niaj agoj kaj iliaj efikoj por nia planedo. Tial tiel grava estas nia konscio kaj la sana prudento dum la tuta vivo.



Ni rememoru jarojn de nia infanaĝo ... En nia ĉirkaŭaĵo estis pli pure, pli facile oni spiris, oni ne produktis tiom da forĵetaĵoj, aĉetojn oni faris kun la propra sako aŭ korbo, boteloj estis vitraj kaj ne plastaj kaj vestaĵojn kaj ĉiujn ilarojn oni uzis dum multaj jaroj kaj ofte uzis ilin ankaŭ sekvaj generacioj.

Ni zorgu pri nia tero! En tiu zorgo kuniĝu ni ĉiuj! Ĉiu, eĉ nia la plej malgranda ago, estas ege grava! Ĉiun ŝanĝon oni devas komenci enkonduki

de si mem kaj nia planedo kaj sekvontaj generacioj certe estos dankemaj al ni. Ni mallarĝigu ligilojn kun naturo, kreante respondecan sin-tenon por la nuna kaj estonta mondo. Ni intervenu tie, kie oni detruas naturon je la nomo de kiu ajn interesoj... Ni agu, por garantii estontecon al si kaj al la sekvontaj generacioj.

Daŭrigo sekvos en la parto „*Mi prudente aĉetas kaj dank' al tio mi malpli forĵetaĵojn produktas*”.



Memoru pri Monda Tago de la Tero - la 22-an de aprilo

## Arĝenta Mazi

Mi estas Karlo! Tiel prezentas sin ĝardenisto, kiu kultivas ĝardenon de la Reĝo de Gondolando. Li, simpla laboristo, enamiĝas en la princinon Silvja, ŝi reciprokas la amon kaj ili geedziĝas. Tiamaniere Karlo akiras la titolon de princo. Li estas unu el la protagonistoj de la televida Esperanto-kurso „Mazi en Gondolando”. Filmfiguroj estas desegnaĵoj, kiuj moviĝas kaj parolas. Sed ilia voĉo estas pruntedonita de nevideblaj aktoroj. La ĝardenisto-princo parolas per la voĉo de Mieczysław Moroński.<sup>5</sup> Ĝus mi legis nekrologon pri la forpaso de tiu ĉi artisto en la aĝo de 60 jaroj. Li estis 35-jarulo, kiam li voĉe dublis la ĝardeniston. „Mazi en Gondolando” ĝus celebris sian arĝentan jubileon, ĉar ĝi estis esperantigita en la jaro 1995.

# Mazi en Gondolando



Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kies direktoro estis la pola esperantistino Mila van der Horst-Kolińska, lanĉis aŭdacan projekton realigi kurson de Esperanto en la formo de filmo, kiun oni povus vendi al televidstacioj, kluboj kaj individuaj personoj. Ŝi proponis al mi realigi tiun ĉi ideon. Mi pristudis la aferon kaj konstatis, ke fari interne de Esperanto-movado kurson je profesia nivelo estas nerealigebla fantazio. Sed mi hazarde kontaktis la polan firmaon, kiu posedis licencon de BBC pri „Muzzy in Gondoland” - la kurso de la angla lingvo, taŭga por infanoj ekde 2 ĝis 100 jaroj. Mila van der Horst Kolińska konvinkiĝis pri ĝia valoro

---

5 Mieczysław Moroński aktoro de la Teatro Rampa en Varsovio (1960 – 2020)

kaj anoncis antaŭpagajn kotizojn, kiuj permesis aĉeti licencon de BBC kaj produkti tiun ĉi kurson en Esperanta versio, titolita „Mazi en Gondolando”. Kvankam estis varbitaj pluraj kunlaborantoj, tamen la efektivigo de la projekto ŝarĝis ĉefe mian dorson. Mi dediĉis unu jaron por tiu ĉi laboro. Ĝi evidentiĝis unu el la plej malfacilaj en mia vivo kaj finiĝis per akuta korinfarkto. En la monatoj majo kaj junio 1995, okazis la plej streĉa fazo de ĝia produktado, urĝigata pro la devo prezenti ĝin dum la UK en Tempereo, julio 1995. Anstataŭ la kongreso, mi „ĝuis” la intensan terapion en la Kardiologia Kliniko.



Kalina Pieńkiewicz – Reĝino



Roman Dobrzyński kaj Jerzy Fornal – Korvaks

La eminenta esperantisto Stefan MacGill tradukis rapide la anglan tekston. Ĝia Esperanta versio fariĝis preskaŭ duoble pli granda, ĉar la Zamenhofan lingvon plilongigas ĝiaj gramatikaj finaĵoj. Ĉiu el ili formas almenaŭ unu silabon. Mi bezonis kvar monatojn por peniga reverkado tiamniere, ke ĉiuj vortoj kaj eĉ silaboj estu sinkronaj kun la movo de lipoj de la parolantaj figuroj. Multfoje necesis eĉ ŝanĝi enhavon de la teksto, por gardi ĝian sinkronon kun bildoj. Mi verkis scenaron kun la preciza tempkodo, kiu per minutoj kaj sekundoj indikas momentojn, kiam aktoroj devas komenci kaj fini sian frazon. En unu filmsekundo sumiĝas 25 bildoj, la dublanto devas atente sekvi tempkodon sur ekrano, komenci paroli, ekzemple en la 10-a ono da sekundo kaj sekvi parolritmon de sia dublato. En 1995 ni disponis pri la moderna tiutempe teknologio de surbendigado. Ĝia aparataro konsistis el projekciilo, kiu vidigis filmbildojn kun la klara tempkodo. La sono estis registrata sur magnetaj bendoj. La voĉo de ĉiu aktoro estis registrata sur aparta bendo, sed ili ĉiuj turnis sin sinkrone kun bildoj ĉiam, eĉ se en la studio troviĝis nur unu dublanto. Tio estis bona sistemo, ĉar ĝi ne bezonis daŭran ĉeeston de la tuta teamo de aktoroj. Praktike ne eblis kolekti ĉiujn samtempe, ĉar ili havis siajn profesiajn taskojn en diversaj lokoj kaj horoj. Aktoroj vizitis la studion laŭ sia horaro.


La teknikistoj kaj mi kiel reĝisoro, devis esti je dispono ekde frumateno ĝis malfrua vespero kaj eĉ dumnokte.

Mi sukcesis varbi dek artistojn. Mieczysław Moroński – *Karlo* kaj Krystyna Kazanecka – *Silva*. Ili ne konis Esperanton, sed ili estis spertuloj pri dublado de

voĉojn en filmoj. Ili ambaŭ lernis la prononcon kaj enhavon de siaj roloj kaj lerte ilin plenumis. Sed ne sufiĉis legi kaj foriri hejmen. Necesis, post ĉiu sekvenco, retroturni ĉiujn bendojn kaj denove starti ilin, por testi la rezulton. Se estis rimarkita ajna eraro, oni devis ripeti la laboron, poste denove ĝin kontroli. Dume la tempo pasis. Kaze de *Karlo* kaj *Silvja*, ĉio iris glate. Ankaŭ la sperta radia parolisto Jakubowski, lerte uzis sian belan bason por la rolo de *Mazi*. Sed li ne volis kanti, ĉar ne konsideris sin profesiulo en tiu ĉi fako. Por serĉi alian basulon, necesis tempo kaj tio pligrandigus koston de la produktatdo. Fine *Mazi* cedis kaj tute bone kantis.



Jerzy Jakubowski – Mazi



Andrzej Tomecki – Petro kaj reĝo,

En la filmo, ĉiuj figuroj estas bestoj. *Karlo* – simpla hundo, *Silvja* - hundineto, *Reĝo* – leono, *Reĝino* – porko, *Korvaks* – korvo. Nur unu figuro posedas homan silueton. Li nomiĝas *Petro*, kiu neniam disiĝas de sia biciklo. Lia voĉo estas tiu de Andrzej Tomecki, la aktoro ĉiopova; li dancas, kantas kaj mirinde ŝanĝas sian voĉon. Neniu povas konjekti, ke la voĉoj de *Petro* kaj *Reĝo* apartenas al la sama persono. Andrzej Tomecki bonege regas Esperanton. Pli frue li prezentis sian programon *Kaj tamen estas Varsovio* kaj rondvojaĝis kun ĝi tra la vasta Esperantujo, sed ankaŭ pollingve li ludis al poloj, loĝantaj en eksterkando. *Reĝino* estis Kalina Pieńkiwicz, la <sup>6</sup> aktorino de la renoma „Teatr Polski” en Varsovio. Ŝi fondis, kun sia edzo Zbigniew Dobrzyński,<sup>7</sup> la propran Polan Teatron „Antoni Grabowski”. Ili, dum la jardeko 1971-1980, prezentis preskaŭ centfoje la dramon „La proksima nekonato” de Aleksander Ścibor-Rylski en Esperanto kaj en la pola lingvo, en Usono, por tie loĝantaj poloj.

La plej malfacila rolo, laŭ la arta vidpunkto, estis tiu de *Korvaks*, plenumis ĝin Jerzy Fornal,<sup>8</sup> aktoro de la „Nacia Teatro” en Varsovio. Lia kontribuo al la teatra arto en Esperanto estis granda. Kun sia edzino - Zofia Banet-Fornal li fondis en la jaro 1982 la teatron „Espero”, kiu produktis multe da spektakloj preskaŭ ĝis ilia

6 Kalina Pieńkiwicz, aktorino de „Teatr Polski” en Varsovio, (1935 – 1996)

7 Zbigniew Dobrzyński, konata filmaktoro (1935-1984)

8 Jerzy Fornal, aktoro de „Teatr Narodowy” en Varsovio (1926 – 2013)


morto en la jaro 2012 (Zofia) kaj 2013 (Jerzy). Li perfekte interpretis la malbonulon *Korvaks*, kaj eĉ foje konfesis, ke tio estis la plej bona rolo dum lia vivo. Sed ĝia surbendigo estis la plej malfacila kaj okupis preskaŭ tiom da tempo, kiom bezonis ĉiuj aliaj artistoj. La epizodajn rolojn ludis parolitoj de Esperanta Redakcio de Pola Radio, Andrzej Pettyn kaj Barbara Pietrzak. Alia profesia aktoro, Kazimierz Mazur, malmulte laboris en la unua parto de la Esperanta kurso, sed bonege rolis kiel helpanto de *Korvaks* en la dua parto de la kurso, kun la titolo „Mazi revenas al Gondolando”. Dum la jubilea UK en Varsovio (1987), li furoris kun sia prezento de la dramo „Neĝa blovado” de Aleksandro Puŝkin en la traduko de Antoni Grabowski. Amuza fakto estas tio, ke Grabowski, kiel inĝeniero pri kemio, ricevis laboron en Rusujo kaj lernis la rusan lingvon tradukante en Esperanton tiun ĉi verkon.



Kazimierz Mazur – helpanto de Korvaks R. Dobrzyński kun Krystyna Kazanecka - Silvia

\*\*\*

Rememorigante, post 25 jaroj, la naskiĝon de „Mazi en Gondolando”, oni povas miri, kiom multaj estis tiutempe profesiaj artistoj, konantaj kaj apogantaj Esperanton.



## Iga Świątek - reĝino de Parizo

Sabate, la 10-an de oktobro 2020 tenisistino Iga Świątek iĝis aŭtorino de unu el la plej gravaj polaj sportaj sukcesoj - ŝi venkis en tenisturniro de "Roland Garros" en Parizo. La turniro apartenas al la plej prestiĝa kategorio, t.n. "grandŝlemo". Tiel ŝi iĝis la unua pol(in)o, kiu gajnis tiuspecan konkurson en solludo. Pola tenisistino bonege ludis dum la tuta turniro gajninte 7 matĉojn, ne perdinte eĉ unu serion.



En la finalmatĉo ŝi venkis rusdevenan usonaninon Sofia Kenin 6:4, 6:1. Plie en parludo kune kun usonano Nicole Melichar ŝi atingis la duonfinalon.

Iga Świątek estas 19-jaraĝa ludantino kaj tio estas ŝia unua venko en profesia tenisturniro, samkiel estas unu el la plej junaj venkintoj de pariza konkurso dum

ĝia preskaŭ 130-jara historio kaj la plej juna en 21-a jarcento.

Antaŭe Iga havis jam similajn sukcesojn sed inter junaĝaj sportistoj: en 2018, en tiu kategorio, ŝi venkis en prestiĝa turniro en Londono - Wimbledon en solludo. En parludo estis venkistino en Parizo en la sama jaro kaj ora medalistino de Junularaj Olimpikoj.

Iga Świątek kun  
arĝenta Pokalo Suzanne  
Lenglen<sup>9</sup>  
fot. Ian Spencer  
Langsdon/EPA



<sup>9</sup> **Suzanne Lenglen** estis franca tenisistino, vivanta antaŭ la dua mondmilito, venkistino de multaj tenisturniroj. Kromnomita "la Divine" (la Diino), ŝi estis la unua internacia stelulino de virina teniso.

Pokalo por venkistino de la turniro en solludo estis nomita omaĝe al Suzanne Lenglen. La pokalo kreita en 1979 estas posedaĵo de la Franca Tenisa Federacio (FFT). Ĉiuj gajnintoj de solludo ricevas ĝian kopion.

Marija Belošević, prezidantino de IKUE

## Tertremo en Kroatio

La ĉefurbon Zagrebo la tertremo trafis unue la 22-an de marto, kaj nun denove moviĝas la tero en la ĉirkaŭaĵo de Zagrebo.

La centro troviĝas malpli ol 40 km for de la ĉefurbo. Unue du fortaj tertremoj okazis la 28-an de decembro kaj plia iom posttagmeze la 29-an de decembro, tiu kun forteco de 6,3 gradoj (eĉ pli forta ol la marta en Zagrebo).

La urboj ĉefe trafitaj estas Sisak, Petrinja kaj Glina kaj pluraj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo.

Pluraj homoj restis sen la loĝdomoj, eĉ iuj vilaĝoj preskaŭ tute malaperis. Bedaŭrinde, ankaŭ sep personoj mortis dum la tertremo, kaj unu akcidente poste, dum la renovigo de la tegmento.

Ankaŭ en Zagrebo, ĉefe en centro estis damaĝoj ĉe la domoj, kiuj estis trafitaj de la tertremo dum marto. Tamen, tio ne estas komparebla kun supre menciitaj urboj. Gravas la mencio, ke la tertremoj de la unua, la 28-an de decembro, fakte estas konstantaj. Aperis kelkaj ĉ. 5 gradoj-fortaj, kaj ceteraj estis de 1.3-4 en la sama teritorio.

En la Diocezo de Sisak estis detruitaj ankaŭ pluraj preĝejoj (i.a. la katedralo), tamen oni donas la prioritaton al la prizorgo de la loĝantaro. Provizore, por tiuj kies domoj estas en danĝera stato (plurajn domojn oni devos komplete rekonstrui), *Caritas* prizorgas dometojn.

La helpo venas de en- kaj eksterlando: registaroj, ekleziaj instancoj, societoj, unuopuloj....

La episkopo de la Diocezo Sisak estas ja konata al ni esperantistoj. Ni havis eblecon renkontiĝi kun li en la jaro 2001, okaze de la Ekumena E-kongreso en Zagrebo. Tiam li estis la zagreba helpepiskopo. Antaŭ dek jaroj, episkopo Košić en Sisak gastigis la kongresanojn kaj celebris la meson en la katedralo, kiu nun estas detruita.

Se vi deziras sendi helpon, informiĝu, ĉu la kolektadon organizas la loka paroĥejo aŭ *Caritas* aŭ *Ruĝa kruco*. Ĉi-momente oni koncentriĝas al la kolektado de iloj por ripari la domojn, kaj longdaŭraj manĝaĵoj.

Se en via urbo/regiono vivas kroatoj, supozeble ilia societo organizas la kolekton. Por eblaj kontaktoj kun tiaj societoj, vi povas skribi al mi, kaj mi povos serĉi pli da informojn pri la kontaktoj. Se vi preferas, vi povas enpagi la monon al la banka numero de *Caritas* de la Diocezo Sisak.

Jen la donitaĵoj: Caritas Sisacke biskupije, Trg bana Josipa Jelačića 1, 44000 Sisak, Kroatio



SWIFT CODE: OTPVHR2X (OTP Banka, Domovinskog rata 61, Split), indiko: "za stradale u potresu" / "por suferintoj dum la tertremo"

Mi uzas la eblecon kaj dankas al tiuj, kiuj jam sendis la helpon. Dio benu kaj gardu nin.

## Vizitindaj loko

*Robert Kamiński*

### La plej granda palaco en Eŭropo

Ĉu vi scias, ke en Pollando troviĝis la plej granda palaco en Eŭropo (antaŭ ol oni konstruis la francan Versailles)? La impona, grandega ruino de la palaco, nomata Krzyżtopór (Kruĉtoporo), troviĝas en Ujazd, en la mezlanda sanktkruca vojevodio (województwo świętokrzyskie). La loko estas vere vizitinda.

La palacon konstruis, en la jaroj 1627–1644, la vojevodo Krzysztof Ossoliński. La konstruaĵo neniam estis finkonstruita. Ĝi estas granda, italstila palaco en la tipo de „palazzo in fortezza”.

La aŭtoro de la projekto estis konstruanto, konata kiel Lauretius de Sente (Wawrzyniec Senes). La fondinto de la konstruaĵo, Krzysztof Ossoliński, ĝois pri ĝi mallonge, ĉar li mortis subite, jaron post ĝia finkonstruado. Krzysztof Ossoliński estis geedzita tri foje kaj havis nur unu filon de sia unua geedziĝo - Krzysztof Baldwin. En 1648, Krzysztof ekiris kun grupo de 100 husaroj en militan ekspedicion kaj dum la sanga batalo ĉe Zborów, en 1649, estis mortigita per sago. Krzyżtopór transiris en la manojn de la parencaj familioj Kalinowski, Denhoff, Morsztyn kaj Pac.



La 30-an de oktobro 1655, la palaco estis okupita de svedoj. La invadantoj, gvidataj de la generalo Duglas, eniris la kastelon, venkante ĝin per trompo, sen unu pafo. Laŭ sia kutimo, svedoj, okupante la fortikaĵon, forportis al Svedujo, probable ege riĉan internan meblaron, kune kun biblioteko kaj la familia arkivo. Tamen, ili ne difektis la kastelajn murojn.

La generalo Michał Jan Pac, en 1760, renovigis la sudan parton. La kastelo estis loĝata ĝis 1770, kiam ĝi estis forbruligita de la rusa armeo, dum la defendo de subtenantoj de la Bar-Konfederacio, kiuj estis favorataj de la

posedanto. En 1787, la kastelo estis vizitita de la pola reĝo Stanisław August Poniatowski. En la jaroj 1782-1944 la kastelo estis posedaĵo de la familioj Sołtyk, Łempicki kaj Orsetti. Post la dua mondmilito transprenis ĝin la Ŝtatfisko.

La konstruaĵo konsistis el tri bazaj partoj: la palaca komplekso kun bienaj konstruaĵoj, defendaj fortikaĵoj de la bastiona tipo kaj, ekster la fortikaĵoj, italstila ĝardeno. La konstrumaterialo estis ŝtono kaj briko. La akso de la objekto estis la pordega turo kaj bastiono, nomata la Alta Poto kun okangula turo. La trietaĝa palaco estis konstruita laŭ la rektangula plano, kun elipsa interna korto. Al la ĉefa korpo de la palaco oni alkonstruis, de



la nordokcidenta flanko, alon kun la granda salono sur la unua etaĝo, finita per la okangula turo.

La flankaj aloj de la palaco - kun kvar kvarflankaj turoj ĉe la anguloj - ĉirkaŭis la grandan eniran korton. La fasado de la palaco estis kolorigita flave. Sur la surfaco, inter la fenestroj, estis pentritaj portretoj de la familio Ossoliński kaj reprezentantoj de familioj rilatantaj al la bildotekstoj de sur la sube lokigitaj marmoraj tabuloj. (ili estis parte videblaj eĉ meze de la 19-a jarcento). La tutan fortikaĵon ĉirkaŭis fosaĵo.

Nuntempe, la palaco havas la statuson de konstanta ruino. En la antaŭa klasifiko de monumentoj, ĝi apartenis al la plej alta, la nula klaso. La konstruaĵo

estas ruino, grandparte konservita, do interesa por viziti. Ĝi konsistas el ampleksaj fortikaĵoj: bastionoj, ĉirkaŭfosaĵo, spuroj de fortikaĵoj kaj pontoj. Ĝi estis la plej granda palaca konstruaĵo en Eŭropo antaŭ la ekesto de Versailo. Ekde 2018, ĝi havas la statuson de la historia monumento.


La nomo de la kastelo evoluis. *Krzyż* (kruco) estis simbolo de la kredo kaj politiko de la vojevodo kaj *topór* (toporo) estis la blazono de la familio Ossoliński. Ambaŭ simboloj estas lokitaj sur la enireja pordego al la palaco. La konstruanto mem nomis la palacon *Krzysztofory*, kiu probable devenas de la radiko de lia nomo (greke *Christophoros* - *Krzysztof*). La terposedaĵon Iwaniska, kie troviĝis Ujazd, la familio Ossoliński aĉetis de la familio Ligęza, komence de la 17-a jarcento.

Kastelaj dimensioj:

- volumeno de la konstruaĵoj - 70.000 m<sup>3</sup>,
- la areo de la kastelo - 1,3 hektaroj,
- la tuta longo de la muroj - 600 m,
- la surfaco de la muroj 3.730 m<sup>2</sup>,
- la areo de ĝardenoj – ĉ. 1,6 hektaroj,
- dimensioj de la tuta objekto: nord-suda akso - 120 m, - orient-okcidenta - 95 m,

Oni uzis por konstruo:

- 11 mil tunoj da kvarcita grejso (loka),
- ĉirkaŭ 300 m<sup>3</sup> da *kuna* grejso,
- ĉirkaŭ 30.000 tegoloj
- 200 mil brikoj,
- 500 tunoj da kalko,
- ĉirkaŭ 5.000 m<sup>3</sup> da sablo kaj marmoroj, alabastroj, ekzota ligno. Laŭdire, por akiri akvorezistan morteron, oni aldonis al kalko, ovoblankon de miliono da kokaj ovo.



La rezidejo estas malfermita por turistoj (biletita eniro). Eblas viziti la kastelon dumtage kaj dum elektitaj noktoj. Por viziti la palacon estas preparitaj 5 trakoj.


La plano de la palaco Krzyżtopór laŭ Erik Dahlbergh

Jolanta Kieres

## Rememoro pri Bronisław Kieres

La 21-an de oktobro 2020, forpasis mia kara kaj saĝa frato - Bronisław Kieres. Danke al li mi ekkonis Esperanton kaj longjare mi ĝin uzas kaj ankaŭ instruas. Komenco de mia „renkonto” kun Esperanto estis sufiĉe amuza.

Mia frato estis iomete pli aĝa ol mi kaj ni ambaŭ lernis en la sama liceo en Nowy Sącz. Post trapaso de sia abiturienta ekzameno, li komencis studi juron en Jagielona Universitato en Kraków. Tie, en la jaro 1959, Esperanto kurson gvidis prof. M. Sygnarski. Bronisław estis ege ravita pri la internacia lingvo kaj volis, ke mi ankaŭ tuj lernu. Tamen, en tiu tempo mi preparadis min por abiturienta ekzameno kaj enkonduka ekzameno en Medicina Akademio en Wrocław, kie mi planis studi.



Iun tagon mi ricevis la leteron en Esperanto, skribitan de litova studento el Kaunas (Kowno). Mian adreson donis al li mia frato. Mi komprenis nenion, do mi sendis la leteron al mia frato al Kraków. Li tralegis, tradukis kaj resendis ĝin. Mi tralegis, respondis pole kaj denove sendis al Kraków, por traduko en Esperanton. Tiamaniere okazis kelkaj interŝanĝoj de leteroj. Poste mia frato „strikis” kaj devigis min partopreni E-kurson. En sesdekaj jaroj, en la E-klubo en Wrocław, estis tre vigla vivo kun multe da gejunuloj. Tie mi ekkonis kelkajn gravajn personojn, interalie Adam Pleśniar kaj Eduino Wojtakowski.

Por mi tre agrabla rememoro estas kunligata kun la 100-jara jubileo de Esperanto, en la jaro 1987, kaj la privata postkongreso ĉe mia frato. Ĉirkaŭ 15 personoj-gekorespondantoj de mia frato, de mi kaj de miaj konatuloj alvenis al Krakovo. Ĉeestis japanino, paro el Nederlando, germana familio kun du knaboj, ĉino, du svisinoj, francino. Mia bofratino ĉiutage kuris por 20 peronoj kaj mia frato, havante profundan kaj larĝan scion pri historio, estis gvidanto en Krakovo kaj Wieliczka. Li ofte aldonadis interesajn anekdotojn al la historiaj objektoj. Danke al li, la grupo ekkonis Pollandon kaj ĝuis belajn vidindaĵojn.

Sed ne ĉuj anekdotoj estis kompreneblaj al fremduloj, ekzemple tiu,

rakontita iufoje de Broniek ĉe tagmanĝo: La knabo demandas sian patron : Paĉjo, kia estas diferenco inter optimisto kaj pesimisto? Paĉjo respondis: Ĉu vi vidis svisan fromaĝon? Optimisto vidas fromaĝon, pesimisto vidas truojn. Ni turnis nin al la ĉino, kiu komentis: mi neniam vidis la svisan fromaĝon. Tio estis la fino de la serĉo.

Poste, kelkaj gastoj alvenis al Nowy Sącz, kie ili ankaŭ estis gastigitaj de esperantistoj. Nederlandanoj, rigardante plenajn tablojn de bongustaj manĝaĵoj miris „Ni legis, ke en Pollando estas problemoj, eĉ kun bazaj produktoj, ĉu vere?” Tiam la svisino Franciose, kiu jam multfoje vizitis Pollandon, klarigis:” Jes, sur la tablo estas ĉio, sed ili ŝparis siajn manĝokartojn por viando, dum kelkaj monatoj, por ke ni estu solene gastigitaj”.

Mia frato, partopenante UK-ojn, ofte prelegis por juristoj. Poste li rakontis pri kongresoj en la krakova E-klubo. Lia dua filino Anna ankaŭ lernis Esperanton kaj partoprenis la infanan kongreseton, dum UK en Vieno. Broniek ne nur estis tre aktiva aganto, sed ankaŭ klopodis transdoni sian entuziasmon al la sekva generacio. Ni ŝuldas al li grandegan dankon.

## Linguoscienca angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### De rilate al vorteto

#### **For**

De rilate al *for* montras formoviĝon aŭ apartecon:

- **For de tie ĉi!**
- **For de miaj okuloj!**
- **Ŝi demetis la tukon for de la kapo.**
- **Grandaj vojaĝoj kaj longa restado for de mia hejmo estas por mi afero tre malfacila.**

#### **Pronomoj, pronomecaj vortetoj**

De-esprimoj povas priskribi personajn pronomojn kaj pronomecajn vortetojn, normale pere de verbo, sed iafoje rekte. La signifoj estas la samaj kiel ĉe ne-aga O-vorto:

- **Li estas de meza kresko.** Eco.
- **Ĝi estas de mi.** Aparteno, posedo. Pli ofte oni diras: *Ĝi estas mia. Ĝi apartenas al mi.*
- **Ili estas de Francujo.** Deveno.
- **Tiuj estas de ŝi.** Aparteno, posedo.
- **Ambaŭ estas de Japanujo.** Deveno.
- **Mi preferas tiun de Karlo.** Posedo.

## Tabelvortoj je OM

De-esprimoj povas ankaŭ priskribi tabelvortojn je OM montrante konsiston:

- *Mi volus scii, **kiom de la ŝtofo** ili jam pretigis!* La de-esprimo montras, el kio konsistas la kvanto pridemandata.

## Literaturaĵoj

La unua premio en la literatura konkurso „Esperanto ligas homojn. Pandemio: neĉiutaga ĉiutageco” en 2020j.

*Elżbieta Karczewska*

### Belega Davido à la kronviruso - 19

La kvara semajno de memvola izoliĝo pro kronviruso.

En mia domo loĝas ĉ. 1000 personoj, sed ĉu tio ĉi ion signifas? Mi sentas min terure soleca. De la fenestro mi observas malplenajn kvartalajn stratetojn. De tempo al tempo sonoras mia telefono kaj iu ofertas varojn/partoprenon en agado/petas subtenon por malsanaj infanoj... Ĉiujn kelkajn tagojn mia filino diras per telefono: iru la lifton – mi sendas al vi sakon kun mangâĵo. Bone, ke nenio al mi doloras, sed ĉiu tio estas vero? Ĉu en mia aĝo la homo ne havas sanproblemojn?

Mi konas tiujn najbarojn, kun kiuj antaŭ 50 jaroj ni ekloĝis tiun ĉi domon. Iliajn infanojn kaj genepojn mi renkontas en la lifto, sed alvenis ankaŭ novuloj. Kiu loĝas la etaĝon super mi? Antaŭ unu aŭ du jaroj mi renkontis en la lifto maljunan viron, kiu anoncis, ke li renovigas la loĝejon por sia filino.

Mi estas certa, ke en ilia loĝejo kunvivas hundo, ĉar mi aŭdas frotadon de ĝiaj ungetoj sur la planko. Foje ĝi bojas ĝoje vidante sian posedanton, foje mi renkontas ĝin en la lifto kun iu, kiu promeniĝas ĝin. Lastatempe tio estis maljuna, malriĉaspekta, malgranda virineto. Ŝi havas malmulte da haroj farbitaj je rufa koloro kaj ĝenerale ŝia aspekto deprimas.

La posedantinon de la loĝejo mi ankaŭ renkontis kelkfoje en la lifto. Ŝi estis juna, dikkorpeca, vestita kun bazara eleganteco. Foje ankaŭ ŝi alvenadas sian loĝejon kaj tiam super mia kapo laŭte eksonadas kriado. Viraj voĉoj ŝanĝiĝas... Lastatempe ĝis la malfruaj noktaj horoj muroj tremis pro laŭta muziko disko-polo kaj viraj rakontoj plenaj de malbenoj.

Je la 22.00h. mi iris por frapi la pordon de ŝia loĝejo. La pordo malfermiĝis kaj en ĝi mi ekvidis belegan, junan, senharan, 2-metran Davidon (de Mikelaĝelo) vestitan nur per modesta kalsoneto. Lia brusto certe estis

modelita en iu ekzercejo. Liaj tatuitaj brakoj...

Mi atentigis lin, ke estas jam malfrue. Aldone mi informis, ke la izolado inter niaj loĝejoj plejprobable ne estas ĝusta, ĉar mi aŭdas lian ĉiun paŝon kaj ĉiun diskuton. Mi petis silenton kaj mi revenis hejmen. Li ne respondis.

Dum sekvaj 15 minutoj mi atendis la efikon atente aŭskultante rezonojn super mia kapo. Alterne virina voĉo mallaŭte kaj humile petis kaj vira voĉo kun furiozo kriis, ke se li pagas la luadon li havas rajtojn. Profesoro Bralczyk certe interpretus tiujn „50 putinojn forlasitajn el sako” por pritaksi mian intervenon.

Denove mi iris la etaĝon supren kaj la sceno kun senvorta nudulo en la pordo ripetiĝis. Ĉifoje mi ekminacis, ke mi informos policon. La nudulo silentante fermis malantaŭ mi la pordon. Li ekkriis ne pli frue ol en la kvieto de la loĝejo. Denove la peteganta virina voĉo postulis, ke li vestiĝu kaj foriru. La viro, sufokiĝante pro kolero, anoncis, ke li atendas la alvenon de policanoj. Malrapide la muziko silentiĝis kaj la viro ankaŭ...

Mi ne scias kial tiunokte mi ne telefonis la alarman policnumeron 112, sed la venontan tagon mi vizitis la Administrantaron de la Kvartalo kun la demando: kiu loĝas en tiu loĝejo. La oficistino rifuzis respondi anoncante pri RODO kaj proponis lasi skriban plendon. Ĉiun merkredon la Administrantaron vizitas la ĉefo de la kvartala polico kaj certe li reagos – anoncis la oficistino. En la loĝejo, pri kiu temas, homoj aperadas malofte kaj malfruvespere. Embuski kontraŭ la maljunulino kun la hundo estis sensece. Mi pardonis.

Denove pasis kelkaj tagoj. Daŭris la izolado pro la pandemio. Vekis min bojado de la hundo. Estis la 5.15h matene. Mi jam ne sukcesis ekdormi kaj atendis reagon de la posedanto de la hundo, sed pasadis la tempo kaj la hunda ĝemado sugestis al mia imago diversajn kaŭzojn. Mi imagis ebrian kalvulon kaj lian partnerinon. Eble ili drinkis likvaĵon por malinfektado la plej atingeblan nuntempe kaj veneniĝis... Mi ekhontis pro miaj pensoj. La hundo bojis senpaŭze. Mi vestiĝis kaj iris la pordon de la najbaro. La hundo aŭ bojis aŭ hurlis. Mi frapis la pordon. La hundo ekploris laŭte hurlante...

Mi ekkuris mian loĝejon, per la tremantaj manoj kaptis la poŝtelefonon kaj mi altelefonis la alarman numeron 112. Malmulte mi povas rakonti pri miaj najbaroj al la deĵoranta policano. Mi anoncis mian maltrankvilon supozante, ke iu iĝis malforta en la fermita loĝejo kaj la hundo, la plej lojala el lojaluloj, jam de unu horo alarmas postulante helpon. Antaŭ kelkaj jaroj en nia domo okazis neatendita morto de soleca viro kaj hazarda ektrovo de lia kadavro post dekkelkaj tagoj.

Pasis 25 minutoj kaj al la pordo de la loĝejo alvenis minimume 8 policanoj, 3 fajrobrigadistoj, 2 medicinaj helpantoj plene ekipitaj. Ili aspektis impone vestitaj per la oranĝkoloraj uniformoj de helpanto, kun maskoj sur la vizaĝoj kaj dorsosakoj plenplenaj de akcesoraĵoj. Inter ili estis videblaj ruĝaj uniformoj de fajrobrigadistoj kaj malhelbluaj uniformoj de maskitaj policanoj. Dum 15

minutoj iu el ili frapegis la pordon kriante: mi petas malfermi – ni estas policanoj. La hundo freneziga vokis helpon, sed en iu momento ĝi eksilentis. Eksilentis? Kial? Ĉu tio ĉi estas normala situacio?

Iu diris: se la hundo ne bojas, eble tio ĉi signifas, ke ĉio estas en ordo? Eble iu fermis ĝian buŝon mane por ke ĝi ne boju – ekkonstatis alia persono. Kion ni faru? Silento, do, ne estas kaŭzo por nia interveno. Eble iu alia pli bezonas nian helpon...

Kolektitaj en malfermitaj pordoj de siaj loĝejoj loĝantoj demandis pri la kaŭzo de la interveno kaj sia opinio komentis la akcidenton. La tempo pasadis. La intervena teamo evidente ne havis la komunan aŭtoritaton pretan preni la decidon. Momente pli gravis la opinio, ke se la hundo ne bojas, ĉio estas en ordo. Tiam ekparolis la fajrobrigadisto: se malantaŭ la pordo kuŝas homo bezonanta helpon oni ŝtonigos nin...

Ĉiuj tuj ekkomunikiĝis per okuloj. La dua fajrobrigadisto foriris por alporti pezan ilaron por malekvilibri la pordon. Ni atendis tion, kio okazos en silento, ĉe malfermitaj pordoj de niaj loĝejoj. Post kelkaj minutoj atingis nin bruo de la elektra borilo.

En la sama momento iu ekkriis: haltu! Sur nia etaĝo ekstaris la lifto. Eliris el ĝi maljuna, mizeraspektanta virineto kaj spektante per okuloj plenaj de larmoj policanojn apud sia loĝejpordo diris: ojej, mi foriris nur por minuteto kapti freŝan aeron.

La hundo denove ekfrenezis aŭdante la sonon de ŝia voĉo. La virino malfermis la pordon. Unu el policanoj eniris kun ŝi la loĝejon. La aliaj el la intervena teamo kaj la najbaroj tumultis en la koridoro.

Tra la malfermita pordo komence ni ekvidis la tablon kun restaĵoj de manĝaĵo, malplenajn botelojn de biero kaj aliaj alkoholaĵoj, malpurajn ujojn... En la ĉambro regis malhelo danke al fermitaj fenestroŝirmiloj. Survoje al la lito, surplanke, kuŝis juna paro: li – belega Davido, ŝi – granda, grasa, nekombita, kun disŝmirita ŝminko. Nudaj, enprofundigitaj en peza, drinkemula aŭ narkota sonĝo... La hundo dancis ĉirkaŭ la maljuna virino pepante pro feliĉo.

Kelkajn minutojn poste iu policano registris miajn datumojn kiel la persono, kiu anoncis la akcidenton, komentante aldone: plej gravas, ke nenio okazis. Daŭre mi ne scias, kiu loĝas en la loĝejo super mi.



Kun plezuro ni prezentas, unuan fojon en „Pola Esperantisto”, versaĵojn de la esperantistino Gizela Sklorz el Pyskowice. Jen ŝiaj pripensoj pri la suferanta nin pandemio.

*Redakcio*



## Vakuo

Silentiĝis niaj stratoj,  
urbaj parkoj malplenas,  
perdinte laboreblecojn,  
ni - senfortaj – kaŝploras.

## Pandemonio

La morgaŭon necertaj,  
pro neatendita perforto,  
ni atendas, malspertaj,  
ŝanĝon de la monsorto

## Novjaraj pripensoj

La Nova Jar' portas esperon  
kaj portas ankaŭ maltrankvilon,  
pripensojn, serĉadon de vero,  
por ĉiu tago borilon.

*Gizela Sklorz, 8.01.2021r.*

## Saĝulaj pensoj

*Jarka Malá el Ĉeĥio*

### Pri la vakcin-simila efiko de la protektaj maskoj

Eĉ la plej kutimaj protektaj maskoj reduktas la penetron de fremdaj patogenoj en niajn pulmojn Samtempe ili limigas la eblon, ke ni povus infekti iun per niaj infektaj partikloj. Sed laŭ sciencistoj, ili eble havas alian pozitivan. Ili povas havi vakcinan efikon.

Diskutoj pri tio, kiom la maskoj protektas kontraŭ la penetro aŭ eskapo de patogenoj el niaj buŝoj, estis faritaj ekde la komenco de la kronviroza pandemio. Estas konsento, ke estas certe pli bone porti ilin ol promeni inter homoj, dum ĉi tiuj tempoj, sen la maskoj. Ŝlosila argumento por tiu interkonsento estas redukti la probablecon de disvastiĝo de la malsano. Surprize, ilia neperfekteco povas esti malantaŭ la sekreto,



kial tiom da infektitoj estas tiel dirite sensimptomaj.

"Se vi ricevos malpli grandan dozon de la viruso, via korpo plej verŝajne povos prizorgi kaj forigi ĝin. Vi estas infektita, sed vi havas sensimptoman infekton. Ĉikaze, tre probable, vi eĉ ne havos altan virusan ŝarĝon. Tio signifas, ke malpli altaj virusaj ŝarĝoj rilatas al malpli grava malsano", klarigis infekta kuracisto kaj profesoro ĉe la Universitato de Kalifornio en San-Francisko.

Esploristoj ĵonglas per du konceptoj por klarigi la eblajn pozitivajn ecojn de protektaj maskoj: nome virusa dozo kaj virusa ŝarĝo. La virusa dozo estas la kvanto de viruso, kiun oni ricevas, kiam oni kontaktas infektitan homon, tio estas, antaŭ ol eksplodas la propra infekto. La virusa ŝarĝo estas la kvanto de viruso, kiun oni havas en sia korpo dum infekto. Studaĵoj (sed ne ĉiuj) konfirmis, ke la virusa ŝarĝo estas des pli alta, ju pli malbona estas la sanstato de la paciento.

La sciencistino publikigis kune kun kolego materialon pri la ligo inter virusa ŝarĝo kaj protektaj maskoj. Ili prezentis la teorion, ke neperfektaj maskoj povas esti similaj al tio, kio okazas post vakcinado por provoki imunan respondon. Se la virusa dozo estas sufiĉe malgranda, ĝi eble ne kaŭzas la malsanon, sed ĝi tamen povas provoki imunan respondon.

La sciencistoj rimarkis interesan fakton. En lokoj kaj situacioj, kie la portado de maskoj estis deviga, la indico de la sensimptoma infekto estis ĝis 80 procentoj inter la infektitoj, sed en la statistikoj pri tuta Usono tiu indico situis averaĝe ĉe nur 40%.

Laŭ la sciencistoj, la masko evidente filtras certan dozon de iuj virusaj partikloj, sed tamen iu parto penetras en la korpon. Kaj ĉi tiu malmulto ekigas deziratan imunan respondon, similan al tiu de vakcinado. La rezulto estas imuna individuo. Sciencistoj komparas tiun funkcion kun la tiel nomata variolado. Tio estis kutime la procezo imunigi individuon antaŭ la malkovro de vakcino mem. Tiutempe homoj estis intence elmetitaj al malgrandaj pecoj de variolo-infektitaj substancoj - kiel krustoj - kaj tiel akiris imunecon al ĉi tiu mortiga malsano en la plej bona kazo.

Samtempe tiel funkciantaj maskoj klarigus, kial iuj homoj neniam havis simptomojn de kovim-19, sed tamen havas antikorpetojn. Tamen, ambaŭ esploristoj agnoskas, ke necesos kelkaj testoj kaj pliaj esploroj, por konfirmi tiun teorion.

Samtempe, la sciencistino atentigas, ke ni ankoraŭ ne povas kontroli ĉu, kiam kaj kiom da virusaj dozoj ni ricevas en la korpon. Sekve, laŭ ŝi, estas plej sekure konservi fizikan distancon, observi higienajn regulojn kaj porti maskon. Eble ĝi vakcinas nin, ĉu ne?





### *Mireille Grosjean, Kongreso de ILEI en 2021*

Grava anonco! Pro diversaj pandemiaj kaj organizaj malfacilaĵoj, la Estraro decidis, dum sia lasta retkunsido 12.01.2020, translokigi la ILEI-kongreson 2021 al Benino, al ĝia ekonomia ĉefurbo Kotonuo. La loko estis elektita pro diversaj kialoj: trankvila lando, kun favorprezaj kondiĉoj, relative sekura rilate al kronviruso, lerta loka Esperanto-movado, longaj interrilatoj kun ILEI, UEA kaj TEJO.

La kongreso okazos de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto, por eviti kolizion kun aliaj planataj famaj Eorenkontiĝoj.

La Estraro arde petas membrojn, kiuj volus partopreni en la ILEI-kongreso en Benino, anonci sin. Tio multe plifacilos plani la preparadon. Ne temas pri tuja aliĝo, certe, ĉar la decido mem dependas de multaj cirkonstancoj kaj postulas detalajn pripensojn. Tamen, simple anonci, ke “mi intencas partopreni kaze de la favora situacio” – tio ege helpas en preparado de la kunveno.

La kongreso estos hibrida: ĉeesta (se eblos) kaj virtuala. La Estraro interkonsentis, ke la firma, definitiva decido pri la ĉeesta kunveno okazos ne pli frue ol komence de junio, du monatojn antaŭ la kongreso. Tion postulas la nuna epidemia situacio.

La 54-a ILEI-Kongreso

**ESPERANTO  
KAJ EDUKADO**

Esperanto-kulturo  
en Esperanto-kursoj

7-14 aŭgusto 2021 Kotonuo, BENINO



### *Adam Wilkus, Denove pri ŝakoj*

Saluton! Jen mallonga filmo <https://tiny.pl/r1t46> pri interesaj ŝakludaj situacioj, prezentataj de Robert Nielsen, kiu organizas, kutime sabate vespere, la ŝakludan turniron de esperantistoj pere de la retejo <https://lichess.org/team/esperantistoj>. Vi trovos tie informon, kiel aliĝi pere de Facebook aŭ Telegramo.

Mi instigas provi la reĝan ludon, ĉar ĝi ludindas kaj ebligas ekkonatiĝi kun aliaj samideanoj.



## Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021

Forstrekitaĵoj aranĝoj estis planataj, sed, pro la pandemio ne povis okazi, aŭ okazos alitempe

1-3.1. 2021	12-a JES Junulara Esperanta Semajno okazis virtuale kaj samtempe en multaj lokoj.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl
19 - 23 05. 2021	Polyglot Gathering (Plurlingva kunveno) en Teresin	Kvintaga evento kun prelegoj, laborsesioj kaj sociumado por plurlingvuloj www.polyglotgathering.com/ info@polyglotgathering.com
21.-24.05. 2021	Germana Pola Esperanto-kongreso Fervoista E-kongreso en Stubice kaj Frankfurt ĉe Odra	Pola Esperanto-Asocio Germana Esperanto-Asocio Internacia Fervoista Esperanto Federacio
23.07- 1.08.2021	Pol'and'Rok - PollandRok (eks-Woodstock) Memzorga renkontiĝo de mojosaj, festemaj esperantistoj kadre de la senkosta rokmuzikfestivalo	<a href="http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php">http://krokodilo.de/woodstock/woodstock.php</a> andim(ĉe)gmx.li
25.07 - 1.08. 2021	94-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bjalistoko SAT en Bjalistoko	Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Bjalistoka Esperanto-Societo

## Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bel fasto (Nord-Irlando) Okazos en 2021	Universala Esperanto-Asocio uea.org
1-8.08. 2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 nur okzis virtuala kongreso UK en tradicia formo UK okazos en 2022	Universala Esperanto-Asocio uea.org

## Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

9.17. 07.2021	Somera Esperanto-Studado (SES) okazos en Kroměříž Ĉeĥio	E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net
3.-10. 06.2021	Baltaj Esperanto-Tagoj (BET-56) en Jelgava, Latvio	Latvia Esperanto-Asocio margarita.zelve(ĉe)gmail.com
17-21. 10.2021	9-a EMA Esperantista Migrado Aŭtuna en la Palatinata Arbaro, okcidenta Germanio	www.esperanto.de/eo/ema-eo, ema@esperanto.de
26.07- 1.08. 2021	77-a Internacia Junulara Kongreso, IJK en Kijevo, Ukrainio	http://ijk2021.retejo.info/#, tejoofficejo@gmail.com

## Diverse, facile, bonguste

*Magdalena Tatara*

### Pirogoj - tradicia pola manĝaĵo

Pirogoj (pole: *pierogi*) estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj manĝaĵoj en Pollando. Temas pri pasteĉoj, faritaj el faruno kaj plenigitaj per diversaj farĉoj - muelita viando, fromaĝo, legomoj, fruktoj ktp., poste boligitaj aŭ bakitaj.

En Pollando pirogoj plej ofte estas boligataj en akvo (ankaŭ povas esti bakitaj) kaj ili povas havi dolĉan aŭ maldolĉan farĉon. La plej grava estas pastaĵo, kiu devas esti maldika, mola kaj samtempe firma, por ke ĝi ne rompiĝu dum bolado en akvo.

Mi proponas al vi mian, elprovan kaj facilan recepton, por prepari polajn pirogojn. Jen, kio estas necesa, por prepari bonan paston por pirogoj:

- 250 gramoj da kribrita faruno
- duonkulereto da salo
- 40 gramoj da mola butero
- 100 mililitroj da varma, aŭ preskaŭ bolanta akvo

La plej facila farĉo estas el sezonaj fruktoj, kiel fragoj, mirteloj, pomoj, ktp. (kun iom da sukero kun pli acidaj fruktoj)

Farĉo el pomoj

- 500 gramoj da pomoj
- duono da ĝlaso da sukero
- unu saketo da vanila sukero

- du kuleretoj da cinamono

Purigu la pomojn, senŝeligu kaj tranĉu ilin en malgrandaj kuboj (poste metu ilin en poton kaj enŝutu cinamon, vanilan sukeron kaj sukeron, kaj aldonu iom da akvo. Boligu, kirlante ofte ĉirkaŭ 10-15 minutojn, ĝis la pomoj moliĝos kaj la suko vaporiĝos.

La plej konataj pirogoj en Pollando estas "rusaj pirogoj" ("*pierogi ruskie*"), kies farĉo estas farita el kuiritaj terpomoj, miksitaj kun la blanka fromaĝo kaj fritita cepo.

Por tiu farĉo, kiun mi plej ŝatas, necesas:

500 gramojn da boligataj terpomoj, 500 gramojn da blanka fromaĝo kaj unu grandan frititan cepon kaj kompreneble, salon kaj pipron. Ĉion oni devas tranĉi kaj bone miksi.

Aliaj kutimaj farĉoj: kuirita kaj muelita viando, acida brasiko kun fungoj, dolĉa blanka fromaĝo (kazeo).

Preparante paston por pirogoj, oni miksu kribritan farunon, mane aŭ maŝine, kun mola butero kaj salo. Poste, enverŝu varman akvon kaj knedu. Dumtempe oni devas prepari ankaŭ farĉon. La paston oni devas maldike rulpremi, altondi al ĝi

pecojn tranĉitaj en rondajn formojn (ekz. per glaso), meti sur ilin farĉon, faldi je duono kaj bone alglui randojn per fingroj. Por finprepari pirogojn, oni devas boligi ilin. Oni metu ilin en bolantan, iome salitan akvon kaj ekde la momento, kiam ili komencas elflui, oni boligu ilin ankoraŭ tri ĝis kvin minutojn. Nedolĉajn pirogojn ni povas manĝi kun butero kaj fritita cepo kaj dolĉajn kun kremo kaj sukero.

Bonan apetiton!



„Rusaj pirogoj” (foto Vikipedio)

## Oni eldonis



En Bjalistoko finiĝis „Literatura konkurso 2020”. Jam aperis rekorde granda 10-a numero de „Bjalistokaj Kajeroj” kun ĉiuj verkoj de la konkurso „Pandemio: neĉiutaga ĉiutageco”. Ĉiuj verkoj estas publikigitaj en du lingvoversioj: en la pola kaj Esperanto. La listo de verkoj kaj aŭtoroj estis prezentita dum la 21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, en la retpaĝo de la Societo kaj en Fejsbuko. La ĉefpremiita verko estos plene publikigita sur la paĝoj: [espero.bialystok.pl](http://espero.bialystok.pl) kaj [ksiaznicapodlaska.pl](http://ksiaznicapodlaska.pl).

Silezia Esperanto-Asocio, en 2020, preseldonis tri eldonaĵojn: broŝuron „Esperanto-movado en Vroclavo kaj Malsupra Silezio” kaj du kantarojn „Lernado per kantado”. En la du kantaroj estas prezentitaj 119 kantoj. Ĉiuj eldonaĵoj preparis teamo de multaj helpantoj. En la teamo elstarajn rolojn havis la aŭtorino de la koncepto kaj la ĉefa realigantino de la projekto Ewa Tracz kaj SEA-prezidantino Teresa Pomorska. Helpis Edward Wojtakowski, Bogdan Dembiec kaj aliaj.



## Forpasis

La 1-an de oktobro 2020 en Poznań forpasis merita por Esperanto-movado, longdaŭra delegito de UEA, samideanino,

**Halina Marta Oleszek.**

La adiaŭa ceremonio okazis la 21-an de novembro 2020 sur la tombejo Junikowo en Poznań.

Kun la granda malĝojo, Zbigniew Kornicki el PEA-filio en Poznań

La 14-an de januaro 2020 en Sopot forpasis samideano, **Zygmunt Lange.** La entombiga ceremonio okazis la 30-an de januaro sur la tombejo ĉe la str. Malczewskiego en Sopot.

Kun la granda malĝojo, Jagoda Greger

La 28-an de oktobro 2020 en Krakovo, travivinte 79 jarojn, forpasis la doktoro pri Juraj Sciencoj de la Jagelona Universitato. juĝisto de la Distrikta Tribunalo en Kraków, samideano **Bronisław Kieres**. La entombiga ceremonio okazis la 12-an de novembro 2020 sur la tombejo Batowicki ĉe la str. Reduta en Krakovo.  
Kun la granda malĝojo, Estraro de PEA-filio en Nowy Sącz

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### 6-aj Esperantaj Tagoj de Staszów, 21-24.05.1992

La aranĝon organizis E-Klubo en Staszów, kunlabore kun la loka Kulturdomo kaj Urba Estraro. Al la kunveno venis 94 personoj el Pollando kaj Germanio.

Diversspecan programon realigis interalie: Grażyna Porada, Andrzej Pettyn, Marian Kostecki, Bernhard Westerhoff, Kabaredo AMUZO.

Krom la interesa programo, okazis ekskursoj al la kastelo en Ujazd, al Kurozweki, Szydłów kaj Wiśniowa.

En Ujazd gastoj de la aranĝo vizitis la grandan, italstilan palacon Krzyżtopór, konstruitan de la vojevodo Krzysztof Ossoliński dum la jaroj 1627–1644. En Kurozweki ni rigardis palacon de la familio Popiel kaj ĉevalbredejon. Dum vizito en Szydłów esperantistoj admiris la eksterordinaran, reĝan kastelon el 15-a jarcento, kiun vizitis dek sep foje la pola reĝo Władysław Jagiełło.

En Wiśniowa vizitinda estis la palaco de la familio Kołłątaj kaj la preĝejo, kie troviĝas la koro de Hugo Kołłątaj – la pola politikisto, katolika pastro, kanoniko, kaj poeto, kiu partoprenis en la kreado de la pola Konstitucio de la 3-a de Majo”.

Vespere, la partoprenantoj amuziĝis ĉe bivakfajro kaj en diskoteko.

A. Pettyn registras paroladon de urbestro







↑Prezentado de ĉevaloj en la ĉevalbredejo Kurozweki




↔ Esperantistoj ĉe defenda muro en Szydłów-kastelo




Memortabulo al Hugo Kołłątaj en preĝejo en Wiśniowa

↔  
 ↓ Vespera koncerto de Jerzy Handzlik  
 ↓ Vizito en palaco Krzyżtopór en Ujazd



## Amuze

*Adam Wilkus*



### Krucenigmo pri fungoj

1. *La nobla ...* estas manĝebla kaj bongusta fungo. La ĉapelo, supre brunkolora, estas komence globforma, sed ĝi platiĝas. Ĝi grandas de 10 ĝis 25 cm, sed povas atingi 35 cm. La pora, produkta tavolo troviĝas sub la ĉapelo, kiu june havas blanketan, poste verdflovan koloron. La stipo estas blanketa,

klabforma aŭ barelforma en la malsupra parto. La fungokarno estas malmola kaj blanka. Distranĉita, la karno restas blanka, ne bluiĝas. Ĉi tiu fungo formas mikorizon kun multaj specioj de arboj, troveblas kaj en pingloarbaroj kaj en foliarbaroj, sed plej abunde ĝi kreskas ĉe montaraj piceoj.

2. Fungo, kies pola nomo rilatas al la sono, aŭdebla kiam oni tretas sur la maturan fruktan korpon. La fungo enhavas multege da sporoj, kiuj, pro la eksplodo, ekflugas. Junaĝe ĝi havas blankan koloron. Kiam la fungo maturiĝas, la spor-amaso bruniĝas. Kiam la fungo interne ankoraŭ blankas, ĝi estas manĝebla. En la popola medicino de pasintaj jarcentoj, oni uzis la sporojn por kuraci malbonkuraceblajn vundojn, ekz. post amputadoj. Mirinde, la vundoj, kuracitaj per la sporoj de la fungo, tre rapide resaniĝis.

3. *La muŝmortiga ...* estas venena fungo, kiu havas ruĝan ĉapelon kun blankaj makuloj kaj blankan stipon. Ofte videblas kreskanta en t.n. sorĉistina ringo, kio estas natura fenomeno, aperanta en arbaroj dum kresko de kelkaj fungoj. La micelio de la fungoj kreskas radi-direkte, poste elkreskas la fungokorpoj je la sama distanco, ringoforme de la elira punkto.

4. *La sangosuka ...* estas manĝebla fungo kun lamenetoj. Ĝia ĉapelo estas granda je 4–12 cm, karnokolora aŭ havanta diversajn nuancojn de oranĝo, foje kun nuanco de verde. La surfaco estas zonita, foje interplektita. Junaj fungoj havas ĉapelon konveksan, maturiĝantaj konkavan, kun malprofunda kavaĵo en la mezo, en malnovaj specimenoj funelforma, kun longaj superfalditaj randoj. Ĝia haŭto, en alte humida aero, povas fariĝi muka La fungo kreskas sub koniferoj, sur acidaj grundoj kaj formas mikorizan rilaton kun sia gastiga arbo (ekzemple pinio).

5. Tre ŝatata, blankkolora manĝofungo, speco de agariko, kun komence palaj, rozkoloraj, poste ĉokoladbrunaj aŭ nigrabrunaj lameloj. Ĝi estas ofte kultivata sur ĉevala sterko, en mallumaj ejoj. La Esperanta nomo originas de sia franca termino *Champignon de Paris*.

6. Manĝebla fungo, kun iomete pipra gusto. La 3 – 10 cm larĝa ĉapelo de la fungo estas, dum ĝia junaĝo konvekso, poste funelforma, kun iomete enrulita rando. La koloro de la ĉapelo varias de blankeca ĝis ovoflava kaj eĉ oranĝa. La ovoflavaj, dekuraj, kvazaŭlamenoj, je la subo de la ĉapelo estas neregule forkitaj kaj trairas al la stipo. La 3 – 8 cm longa stipo havas la saman koloron kiel la ĉapelo kaj fariĝas pli mallarĝa je la subo. La blanka karno havas la odoron de abrikotoj. Ĉi tiu fungo ŝatas proksimecon de pingloarboj, prefere piceoj aŭ pinioj, sed ĝi formas mikorizon ankaŭ kun kverko, fago aŭ karpeno.

7. Fungo kies diversaj specioj havas nur etan stipon aŭ ili estas senstipaj. Ĝi kreskas flanke sur la arbotrunko. Pluraj el ili estas manĝeblaj. La ĉapeloj estas konko-, reno- aŭ duoncirklo-formaj. La ĉapela suba bazo estas formita de brilaj, tutrandaj lameloj,

ĉapela supro estas kava kaj ne skvama. La fungokarno dum junaĝo estas sukoplana sed kiam ĝi maljuniĝas baldaŭ havas malmolan konsiston. La spora spuro estas blanka ĝis pale argila.

8. La askofungo kun granda, fragile karneca fruktokorpo, havanta kvazaŭ pufe kavan stipon kaj nesimetrie rondforman aŭ konusforman ĉapelon, kies surfaco havas mallarĝajn laŭlongajn kaj laŭlarĝajn listelojn, inter kiuj troviĝas kavoj. Surteraj fungoj estas manĝeblaj kaj bongustaj. Iuj specioj ŝajnas simbiozi kun la radikoj de koniferoj kaj foliarboj, inkluzive de ulmoj, olivarboj kaj maljunaj pomarboj.

9. Manĝebla fungo, kiu havas la 4–12 cm larĝan ĉapelon malhelbrunan, ĉokoladbrunan, foje flavbrunan kun glita surfaco. Sur junaj fungoj ĉapeloj estas duonglobaj, poste plataj kaj larĝaj. La haŭto estas radiforme vejnita, glueca kaj brila, poste sekiĝas. La fungo havas citronflavajn tubojn. La cilindra stipo estas malmola kaj plena, helflava kun brunaj grajnoj supre.

10. *La miela ...* estas malgranda manĝebla fungo kun 3-13 cm larĝa ĉapelo unue duongloba kaj konvekso, poste platigita. Ĝi estas ofta parazito de arboj. Ĉi tiuj fungoj kutime kreskas kune en grandaj aroj. La stipoj de najbaraj fungoj ofte kuniĝas. En juneco la ĉapelo estas mielflava, mielbruna, olivflava, poste olivbruna, malhele ruĝbruna. Kovrita per etaj ruĝecbrunaj, brunaj aŭ nigrecaj skvamoj, kiuj estas la plej malhelaj kaj densaj en la centro. Ĉe malnovaj specimenoj, la skvamoj ofte malaperas kaj la ĉapelo estas nuda. La lameloj komence blankecaj, poste flavgrizecaj, flavaj kun brunaj makuloj konverĝantaj, maldikaj. La fungopiedo 8-18 cm alta, flaveca, mielbruna, ruĝbruna, nigrabruna, pli pala supre, maldika, cilindra, kurba, kun etendita, malglata kaj pli malhela bazo. Ĝi havas larĝan membranecan ringon de orflava koloro, kiu estas kovrita per flavaj flokoj en la suba parto. Karakteriza estas la kapablo elsendi lumon de la fungo nokte (t.n. bioluminesko). Ĉi tiu fungo preferas foliarbojn, sed troveblas ankaŭ ĉe abioj kaj larikoj, ambaŭ ĉe vivantaj arboj kaj ĉe mortaj trunkoj.

11. *La Granda ...* estas blanketa manĝebla fungo kun longa stipo kaj granda ĉapelo, kiu iom similas al sunombrelo. Ĝi estas multaperanta specio, kiu kreskas sur malsekaj herboareoj. Tiu fungo ofte troviĝas en grupoj aŭ sola kaj ofte ankaŭ aperas en t.n. sorĉistinaj ringoj (grupo de fungoj kreskantaj ringoforme sur la cirklo). Karakteriza trajto estas, ke la moviĝebla ringo ĉirkaŭanta la stipon estas loza kaj ŝovebla laŭ la fungopiedo, aŭ eble jam simple falinta suben. Tiu fungo ne bezonas proksimecon de arboj, ĝi formas simbiozon kun herbejaj plantoj.

12. Fruktokorpo de iaj fungoj havantaj tre intensan odoron. Ĝi kreskas subtere kaj estas tuberforma. La askoj estas multfoje globformaj kaj kovras la internajn vojetojn de la fungo. La micelio vivas en simbiozo kun la radikoj de arboj kaj formas mikorizon. Foje

oni kultivadas tiujn fungojn sub maljunaj kverkoj. Ĝi estas la plej multekosta manĝebla fungo.

13. Fungo kreskanta ĉe arbotrunko, unu el poraj lingnofungoj. Ĝi estas timinda parazito de fago, platano, betulo, poplo, kverko, ĉevalkaŝtano kaj aliaj arboj. Rekonebla pro ĝia kreskado en formo de diverskoloraj samcentraj cirkloj, el kiu la ekstera cirklo estas blanka. Iam uzata por fari fajron. Interesa trajto estas, ke la fruktokorpo de la fungo ĉiam kreskas suben, eĉ post la faligo de la arbo. Danke al tiu fenomeno (t.n. geotropismo aŭ alinome planta moviĝo) sporoj de la fungo ĉiam povas facile eliri la porojn uzante graviton.

Anatomio de fungoj: <https://tiny.pl/r5j3b> <https://tiny.pl/r16hd>  
<https://tiny.pl/r5scw>

Listo de elektitaj fungoj: <https://tiny.pl/r5j8j> <https://tiny.pl/r5j38>  
<https://tiny.pl/r55qf>



**Atenton! Fungoj povas esti bongustaj, sed memoru, ke kelkaj fungoj tre similas unu al la alia. Vi devas esti spertulo por kolekti ilin. Alikaze oni povas facile konfuzi manĝeblan kaj venenan fungon!**

**Kiel fungoj kreskas?** Unue la micelio kreskigas ovo-similan, blankan elstarajon, foje nomatan la “diabla ovo” (sendube pro la venena fungo kiu elkreskas). La interno de la ovo kreskas, kio kaŭzas, ke la ekstera membrano (alinome la velo) rompiĝas. La junan fungon tute kovras blanka velo, kiu poste rompiĝas kaj formiĝas la vulvo. Postrestaĵo de la globala velo estas la vulvo ĉe la piedo de la fungo kaj la skvametoj sur la ĉapelo. Poste la ĉapelo plu-kreskas, tiel rompante la partan velon, kiu devas protekti la lamelojn, kiuj formas la sporojn. Postrestaĵoj de tiu parta velo estas la ringo ĉirkaŭ la stipo. Fine, la ĉapelo etendas sin: anstataŭ ronda, ĝi fariĝas plata, por ke la lameloj estu vertikale super la tero, kio ebligas pli bonan disvastigon de la sporoj.

## Vortareto pri fungoj

**ĉapelo** (sporo-portanta fruktaĵo de fungo) => kapelusz (owocnik grzyba zawierający zarodki)

**skvamo** => łuska

**fungokarno** => mięsz grzyba

**himenio** => hymenofor czyli część owocnika grzybów, na której występuje warstwa wytwarzająca zarodniki.

Hymenofor może mieć postać blaszek, rurek, kolców itd.

**lamenetoj** => blaszki

**tuboj** => rurki

**poroj** => otwory

**sporoj** => zarodniki

**dissemado per sporoj** => rozsiewanie przez zarodniki

**fungokorpo** => korpus grzyba  
**stipo** (t.n. **fungopiedo**, **gambo**) => trzonek grzyba tzw. nóżka  
**ringo** => pierścień (na trzonku)  
**velo** (la pli-malpli streĉita membrano de organoj) => membrana, osłona otaczająca mł. grzyba  
**vulvo** (alinome volvrestaĵo aŭ stipingo estas postrestaĵo formiĝita de blanka velo, kiu tute kovris la junan fungon kaj poste rompiĝis) => pochwa grzyba, część osłony całkowitej otaczająca nasadę trzonka  
**asko** => worek grzyba  
**askofungoj** => workowce

**micelio** (funga fadenaro, maso el interplektiĝantaj hifoj, la talo de la fungo, la vegeta parto de micetoj) => grzybnia  
**hifo** (alinome filamento - liniŝajna strukturo, fadenforma elemento de funga micelio) - włókno, które tworzy grzybnię  
**mikorizo** (simbioza relacio de fungohifoj kun la radikoj de la plantoj) => mykoryza  
**mikologio** (scienco pri fungoj, ilia taksonomio, morfologio, biologio, fiziologio, biogeografio, ilia rolo en naturo kaj en vivo de homoj) => mykologia

## Zamenhof/Esperanto-Objekto

*Robert Kamiński*

### Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 1

Ekde kreado de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honorigis lin, nomigante stratojn je la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ planetoidoj. Kreskanta Esperanto-movado sammaniere honorigas ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. Sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritajn objektojn en Pollando. Mi volas prezenti polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996 kaj poste mian registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro „Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitaj al nia majstro kaj Esperanto movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontaktiĝi kun mi. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri Z.E.O en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu Z.E.O. estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
1.	Anielin Swędowski, (apud urbo Stryków, 24 km norde de Łódź)	Zamenhof-strato	?
2.	Białystok	Zamenhof-strato	11.07.1919 /1949
3.	Białystok, kvartalo "Porosty Kolonia"	Antoni Grabowski-strato	1996
4.	Białystok, kvartalo "Porosty Kolonia"	Esperantistoj-strato – (ulica Esperantystów)	1996
5.	Białystok, (ĉe la str. Waszyngtona 17)	Ludoviko Zamenhof-Klinika Hospitalo (Szpital Kliniczny im. L. Zamenhofa)	1988
6.	Białystok, (en Z-Hospitalo, ĉe la str. Waszyngtona 17)	Memorangulo - „Esperanto” en la hospitala konferenca salono	1988
7.	Białystok, (en Z-Hospitalo ĉe la str. Waszyngtona 17)	Ekzercsalono Lidia Zamenhof	1988
8.	Białystok, ĉe la str. Piękna 3	Sidejo de Fondaĵo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo	1992/2000
9.	Białystok, (ĉe la str. Malmeda)	L. Zamenhof-Monumento (busto sur soklo)	1973
10.	Białystok, (Lernejo ĉe la str. Warszawska 8)	Memortabulo pri L. Zamenhof	1987
11.	Białystok, (naskiĝdoma loko ĉe la str. Zamenhofa 6)	Esperantlingva tabulo pri L. Zamenhof	06.08.1959
12.	Białystok, naskiĝdoma loko ĉe la str. Zamenhofa 6	Vitroŝranko kun foto de naskiĝdomo de L. Zamenhof	2008
13.	Białystok, naskiĝdoma loko ĉe la str. Zamenhofa 6	Z-murpenetraĵo - L. Zamenhof sur balkono kaj e-istoj Jakub Szapiro kaj Abraham Zbar	05.06.2008
14.	Białystok, kvartalo Bagnówka	Jokobo Szapiro-strato (ul. Jakuba Szapiro)	2017-2018
15.	Białystok, ĉe la str. Lipowa 33	Esperantlingva omaĝtabulo al Jakub Szapiro	1991
16.	Białystok, str. Rynek Kościuszki 10	Kafejo „Esperanto-Cafe”	01.08.2008
17.	Białystok, str. Mazowiecka 48	Kafejo „Kafejeto”	11.2014

18.	Białystok, str. J.K. Kluka 11 A kvarvalo Bagnówka	L. Zamenhof-Fundamenta Lernejo	15.12.2008
19.	Białystok, ĉe la str. Piękna 3	Memorŝtono pri la planata Monda Centro de Esperanto	1987
20.	Białystok, str. Warszawska 19	Ludoviko Zamenhof-Kulturcentro	25.07.2009
21.	Białystok, - 15 trilingvaj informtabuloj en Esperanto, pola, angla kaj en brajla skribo	Turisma vojo „Esperanto kaj multaj kulturoj”	2009
22.	Białystok, str. Warszawska 19	Esperanto-biblioteko „E-libraro”	12.05.2010, 17.00
23.	Białystok, str. Legionowa 10	Hotelo „Esperanto”	01.09.2012
24.	Białystok, str. Broniewskiego 23, kvaralo Antoniuk	Esperantlingva murpentraĵo, „Liberecon por la mondo”	05.10.2018
25.	Białystok, str. Zamenhofska 1	Monumento al juna L. Zamenhof	14.04.2019
26.	Białystok, str. Leśna 30	Murpentraĵo kun L. Zamenhof sur Fundamenta Lernejo nr-o 20	20.10.2020
27.	Bielsko Biała	Zamenhof-strato	1959
28.	Bielsko Biała	Esperanto-skvaro	1959
29.	Bydgoszcz, ĉe la str. Pestalozziego	Zamenhof-skvaro	1975
30.	Bydgoszcz, proksime al str. Jagiellońska 72	Ponto “Esperanto”	2012
31.	Bydgoszcz, str. Pestalozziego 16	Domo “Esperanto” kun esperantlingva informtabulo	14.04.2016 14.00 h.
32.	Bydgoszcz, str. Curie- Skłodowskiej 10	Andrzej Grzębowski-Memorĉambro	11.2015
33.	Bydgoszcz, tombejo ĉe la str. Stefana Wyszyńskiego	Tombo de Andrzej Grzembowski kun Esperantlingva surskribo „Ripozu en paco”	2014
34.	Bystrzyca Kłodzka	Zamenhof-strato	1960
35.	Bytom	Zamenhof-strato	1959
36.	Chorzów	Zamenhof-strato	1967
37.	Częstochowa, kv. Raków	Zamenhof-strato	1932/1987
38.	Częstochowa, str. Sikorskiego 56	L. Zamenhof-Fundamenta Lernejo nr- o 38 / interne tabulo al patrono de la lernejo	14.10.1987
39.	Duszniki Zdrój, en parko, en kuraca parto de la urbo	Zamenhof-monumento	08.08.1931, 19.06.1948
40.	Duszniki Zdrój, kuraca parto de la urbo ĉe la str. Zdrojowa 5	Hotelo “De Esperanto Sanatorium Uzdrowskowie” (Kuracloka Sanatorio)	2014

Erarĝustigo por PE 6-2020

Sur la paĝo 3 mankas: Tradukis *Robert Kamiński*





La palaco Krzyżtopór en Ujazd Foto: Adventum  
La Virtualaj Zamenhof-tagoj 2020 en Bjalistoko

# NIA FOTOGALERIO



  
**PEA**  
Pola Esperanto-Asocio  
Polski Związek Esperantystów

  
faniMani.pl  
Wiele okazji... do pomagania!

KRS:  
0000507234

CEL:  
22781

**Przekaż nam** 

 Wspieraj nas kupując przez **FaniMani.pl**  
1000 sklepów internetowych do wyboru!

La 1% de imposto estas mirinda iniciato - kaj ni havas grandegan peton, ke vi decidu donaci ĝin al nia organizaĵo :) Sed ĉu vi scias, ke per FaniMani vi povas donaci al ni facile kaj senpage multe pli ol unufoje jare? Serioze, ĉi tio ne estas ŝerco! Vi povas kontroli kiel ĝi funkcios ĉi tie: <https://fanimani.pl/pze/>

Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - [www.podkasto.net/](http://www.podkasto.net/)